Vintro 2014-2015 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 30 No 118

# La Riverego


| | | | |
|---|---|---|---|
| Malkovri Montrealon ! | 2 | Kristnaskaj Rakontoj | 20 |
| Rezolucio por UK-2017 | 11 | Tra la Norda Lando | 21 |
| Konkuro, sed ne konflikto | 12 | Al pacifika marbordo | 29 |
| Geografio de kongresoj | 14 | La ĉaka milito | 30 |
| Venu al Lillo ! | 17 | La Idoj de la Suno | 36 |







**La UEA-reprezentantoj sciuras en Montrealo !**

***Les représentants de l'UEA* écureuillent *à Montréal !***



# Malkovri Montrealon… trovi amikojn !

*Yevgeniya (Ĵenja) Amis*

*Espérant être choisis comme capitale de l'espéranto et recevoir le congrès mondial en 2017, nous avons accueilli les représentants de l'Association mondiale d'espéranto Clay Magalhães et Martin Schäffer. Martin a été impressionné par le dynamisme de la ville (même après la tempête !) et Clay a été ravi par notre ville, ornée de la première grande neige de l'année.*

**Antaŭ ol la Estraro de UEA elektas urbon por la Universala Kongreso, reprezentantoj de UEA vizitas la kandidat-urbojn por inspekti potencialajn kongresejojn, hotelojn kaj vidindaĵojn, kaj ankaŭ por konatiĝi kun la loka organiza teamo. Montrealo — kandidat-urbo por la UK en 2017 — ne estis escepto : inter la 10-a kaj la 14-a de decembro la urbon vizitis la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Clay Magalhães, kaj la Ĝenerala Sekretario kaj estrarano de UEA, Martin Schäffer. Ankaŭ Orlando Raola, la prezidanto de Esperanto-USA, venis, por montri la plenan subtenon de usonaj esperantistoj por tiu komuna projekto de Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA.**

Respondeculo pri Universalaj Kongresoj jam pli ol jardekon, naskiĝinta en Brazilo, Clay neniam estis en Nord-Ameriko ĝis tiu ĉi vizito al Montrealo pro unu simpla kialo : lastfoje UK okazis en nia kontinento antaŭ pli ol 30 jaroj ! Ĝuste pro tio li ŝajne estis tre ĝoja pro la invito de Montrealo gastigi la UK-on : finfine, jen okazo iri al Nord-Ameriko !



Ni esperis, ke Montrealo estos senneĝa dum la vizito de niaj gastoj, sed Patrino-Naturo decidis alimaniere, kaj ĝuste la tagon de la alveno de Martin (maldekstre sur la foto) kaj Clay (dekstre), ambaŭ el pli varmaj lokoj, la urbon kovris densa tavolo de la unua granda neĝo de la jaro. « Tio estas Nord-Ameriko, ne la Norda Poluso, eĉ se nun ĝi aspektas pli kiel la Norda Poluso », ni ŝercis elirante el la flughaveno. Ni rapide konstatis, ke anstataŭ la simbolaj ĉapeto, koltuko kaj gantoj (« por supervivi en Kanado vintre ») ni eble devintus alporti akvoimunajn botojn : la sola afero, kiu vere mankis al niaj gastoj. Sed malgraŭ la ne ĉiam-aparte-agrabla promenado kun la malseka neĝo ankoraŭ surstrate, Martin estis impresita de tio, kiom aktiva estas la urbo eĉ post la neĝoŝtormo kaj antaŭ ol oni forigis la neĝon, kaj Clay, ravita de la blanka magio de la urbo, plezure fotis neĝokovritajn arbojn, stratojn kaj la famajn montrealajn kurbajn ŝtuparojn (legu pli en La Riverego 117).



Nia unua tago estis plene aranĝita de Montreala Turismo — la turisma oficejo de la urbo : nia fidela partnero kaj magia helpanto en tiu grandioza projekto inviti la plej grandan Esperanto-eventon al nia urbo. En la kompanio de profesia ekskursgvidantino kaj verkistino pri fajnaj manĝaĵoj, ni malkovrigis al la gastoj nian urbon.

## La ĉefurbo de kisoj

Landoj — kaj urboj — ofte havas siajn logotipojn: bildon, kiu plej bone reprezentas ilin. Montrealo havas eĉ du : la oficialan (ĝi similas al floro) kaj tiun de Montreala Turismo, kiu elektis kiel simbolon… kison ! Kial kiso ? Unue, ĉar en

Montrealo (kaj Kebekio ĝenerale) virinoj kisas siajn amikojn kaj amikinojn, simile al pluraj landoj de Eŭropo (kutime dufoje, sur dekstra kaj poste sur maldekstra vango), dum en aliaj kanadaj provincoj kaj en la apuda Usono oni ne kisas, sed brakumas amikojn. Estas ankaŭ plia kialo : se vi rigardos mapon, vi vidos, ke la insulo de Montrealo (ja Montrealo troviĝas sur granda insulo sur la rivero Sankta-Laŭrenco), kune kun la apuda insulo, similas al la du lipoj de buŝo, kiuj formiĝis por kiso.

## Aŭto ? Ne ! BBMP !

Traveturante diversajn partojn de la urbo, la gvidantino atentigas nin, ke senescepte ĉiuj kvartaloj de Montrealo estas miksaĵo de privataj loĝejoj kaj komercaj ejoj : alivorte, la urbo tute ne havas pure « dormajn » kvartalojn. Malsimile al pluraj aliaj grandaj urboj, Montrealo ankaŭ ne havas danĝerajn





En la belega preĝejo Notre-Dame



Ni bonŝancis renkonti la Montrealan Simfonian Orkestron, kun ties fama dirigento, Kent Nagano

kvartalojn kaj estas unu el la plej sekuraj urboj en Nord-Ameriko.

La plejparto de la montrealanoj loĝas je malpli ol 30-minuta veturdistanco de sia laborejo, fiere notas nia gvidantino, kaj la plej ofta maniero iri de punkto A al punkto B en la urbo estas « BBMP » : bicikle, buse, metroe kaj piede ! Multaj urboj en Nord-Ameriko estis planitaj por aŭtomobilistoj, sed Montrealo estas iom escepta : ĝi estis planita por piedirantoj, biciklistoj kaj uzantoj de publika transporto : dum aliaj urboj de Nord-Ameriko pli kaj pli ekspansiis al antaŭurboj, por pli malmultekostaj terenoj kaj pli grandaj domoj, Montrealo faris la malon : oni konstruis bonan transportsistemon, kun metroo plene subtere, por ke ĝi funkciu seninterrompe en kiu ajn vetero ; oni faris biciklajn vojojn (kies kvanto grandiĝas preskaŭ ĉiujare) kaj eĉ konstruis la tutan subteran urbon. En Montrealo

oni ankaŭ severe limigas la altigon de prezoj por loĝejoj, tiel ke ĝi estas unu el la plej malmultekostaj urboj en Nord-Ameriko. Ĉio ĉi donis bonajn rezultojn : la montrealanoj adoras sian buntan kaj amuzeman urbon, kaj la plejparto de miaj amikoj ne povas imagi ŝanĝi la komforton de la urba vivo por pli granda domo en antaŭurbo.


En Montrealo oni piediras kaj biciklas en kiu ajn vetero (jes, iuj frenezuloj biciklas ankaŭ vintre !), sed somere oni promenas eĉ pli, ĉar pluraj stratoj fariĝas plene piedireblaj (tute fermitaj al aŭtoj). « Plie, vi eĉ povas peti ke la urbo fermu vian straton por kelkaj horoj. Ni diru, ke vi havas naskiĝtagon kaj volas fermi straton apud via domo por festi kun viaj najbaroj kaj amikoj. Simple avertu la urbon, kaj vi eĉ ricevos du polic-aŭtojn — komence kaj fine de la strato, kaj la policistoj ĝentile avertos la aŭtantojn, ke la strato estas fermita por kultura evento », diras nia gvidantino. Mia edzo kaj mi interŝanĝas signifoplenajn rigardojn : ĉu ni petu fermi straton speciale por ni, por novkreota montreala Esperanto-festivalo ?!

## 32 kilometroj subtere

La fama strato Sainte-Catherine estas, laŭ nia gvidantino, la plej granda butikuma strato en Kanado, sed la 15 km da vendejoj, kiujn oni vidas de sur la strato, estas nur la supra parto de la glacimonto, ĉar la pli granda parto de la butikoj troviĝas ne surtere, sed subtere ! « Kiam, laŭ vi, oni plej ofte iras butikumi subtere? », demandas la ekskursgvidantino. « Kiam neĝas ! » tuj respondas niaj gastoj. « Fakte, ne — kiam pluvas », ŝi korektas kun rideto : « La montrealanoj toleras neĝon (eĉ se ili foje plendas pri ĝi…), sed ili tute abomenas pluvon ». La montreala subtera urbo (oficiale, « RÉSO », homofono de la franca vorto



Prezidanto de Esperanto-USA ĵetante neĝon sur la Ĝeneralan Sekretarion de UEA



En montreala subtera urbo

« réseau » — « reto ») estas plia unikaĵo de la urba planado de Montrealo kaj la plej granda subtera urbo en la mondo. 32 kilometrojn longa (duoblo de la larĝeco de la insulo !), klimatizita kaj kun natura lumo, ĝi interligas la tutan urbocentron en gigantan reton de tuneloj, vendejoj, restoracioj, bankoj, stacidomoj, universitatoj, kongresejoj, biblioteko kaj, kompreneble, metroo : jen perfekta loko por perdiĝi… kaj retrovi sin en iu butiko, aĉetante novajn ŝuojn (kio ŝajne tro ofte okazas al mi ☺). La butikoj funkcias tra la semajno, ofte eĉ ĝis malfrue kaj ankaŭ semajnfine, pri kio Clay surpriziĝis : ja en Okcidenta Eŭropo ili ofte fermiĝas frue kaj ofte ne funkcias dimanĉe — sed ne en Nord-Ameriko !



Katedralo Marie-Reine-du-Monde : unu el la plej belaj en Montrealo (vido el la hotelo)

## Vivi malpli rapide

Kiam la usona kafej-ĉeno Starbuck's venis al Montrealo, ĝi devis ŝanĝi la originalan planon de kafejoj por inkluzivi pli grandajn spacojn por sidi, rakontas al ni la ĉiĉeronino : jes ja, en Montrealo oni estas malpli hastemaj ol en aliaj partoj de Nord-Ameriko kaj oni preferas trinki kafon sidante en kafejo anstataŭ rapidante sur la strato, kaj certe ne en la aŭto. Kial do la vivoritmo en Montrealo estas pli malrapida ? Interalie, dank' al multaj enmigrantoj el mediteraneaj landoj, kiuj preferas malpli streĉan vivoritmon. En multaj laborejoj oni ankaŭ finas labori iom pli frue en vendredo (« kaj se via ĉefo ne permesas al vi foriri frue kaj vi ne havas tro da farenda laboro, vi simple 'malsaniĝas je gripo' kaj ĉiukaze foriras frue »).

Tie, kie vintre kuŝas neĝo, en somero estos multaj terasoj, kie oni sidos ĝis malfrunokte kafumante, manĝante kaj ĝuante bieron aŭ vinon kun amikoj. « Laŭ la kvanto da mikrobierejoj, Montrealo cedas sian lokon nur al Belgio kaj Germanio », diras nia ĉiĉeronino, kiu ankaŭ gvidas manĝaĵ-ekskursojn, aldonante, ke ne estas eĉ unu manĝaĵ-revuo, kiu ne dediĉis la tutan numeron al Montrealo, aparte fama pro sia kuirarto. Tamen, oni bone manĝas ne

nur en multekostegaj restoracioj : eĉ apudstrata sandviĉejo, se ĝi ne faras la sandviĉojn bone, fermiĝos, pro granda konkurenco. Multaj montrealaj restoracioj ankaŭ permesas alporti sian propran vinon aŭ bieron (serĉu ŝildon « apportez votre vin ») — kio multe malgrandigas vian fakturon, kaj alporti siajn proprajn trinkaĵojn en tiuj lokoj ne estas vidata malbone.


## Urbo kreema

Kreemo estas aparta trajto de la montreala karaktero : la urbo de festivaloj (somere en Montrealo okazas ĉirkaŭ naŭdeko !), muziko, modo, videoludoj, kino-arto kaj arkitekturo, Montrealo estas rafinita kombinaĵo de novaj kaj malnovaj elementoj, kiuj kunvivas en harmonio, sen ke unu parto dominu la alian. Bona ekzemplo de tiu kunvivado estas la « Katedralaj Promenadoj » : tiel nomiĝas la parto de la montreala subtera urbo, kiu troviĝas tuj sub bela gotika anglikana katedralo, konstruita en la 19-a jarcento kaj daŭre funkcianta. Kial ĝi estas tiom speciala ? Ĉar oni konstruis parton de la subtera urbo rekte sub ĝi ! Atentemuloj ankaŭ notos, ke la apuda altega ultramoderna konstruaĵo, en kiu respeguliĝas la preĝejo, havas gotik-formajn fenestrojn, kaj ĝia supro similas al mitro (t.a. alta dupinta kapvesto) de episkopo — omaĝe al sia najbara katedralo.

(Dum la sekvaj vizitoj al eventualaj kongresejoj kaj hoteloj, Clay demandis, ŝercante, ĉu la homoj, fakte, volos resti en la kongresejo estante en Montrealo ?!)

## La Reĝa Monto

La lastan tagon ni invitis niajn gastojn al la Reĝa Monto : Mont Royal, kiu donis sian nomon al la urbo. Laŭ unu rakonto, kiam Jacques Cartier, franca esploristo de la 16-a jarcento, alvenis al la supro de la monto kaj de ĝi rigardis al la riverego, li diris, ke la vido de la monto estas vere reĝa. Mi



ne scias ĉu tio veras aŭ ne, sed mi atestas, ke la vido de la monto ja estas reĝa : la blanka neĝa trankvilo de la vintro estas same bela kiel la verda abundo de la somero. 233 metrojn alta, la Reĝa Monto estas grandega parko tute meze de la urbo kaj estas ŝatata de montrealanoj en ĉiu sezono : somere por promeni, pikniki kaj bicikli, kaj vintre por skii, sketi, neĝoŝui aŭ simple promeni — kaj foti sciurojn en ĉiu sezono (ankaŭ Clay ne povis rezisti tiun tenton) ! Ĉar Montrealo estas insulo, sciuroj abundas en nia urbo (ili ja ne povas naĝi por eliri de la insulo !), kaj ili aparte multas sur la Reĝa Monto, je granda amuziĝo de turistoj kaj novaj enmigrantoj.



Clay ne povis rezisti la tenton konatiĝi kun ĉarmaj montrealaj sciuroj

## 38 paroj de brilantaj okuloj

Universala Kongreso estas tre ĝuiga evento, sed ĝi estas ankaŭ tre peza laboro por la loka grupo, kiu invitis la kongreson. Ĝuste pro tio, UEA estas aparte atenta pri la prepariteco de la loka teamo. La montrealaj esperantistoj tre bone impresis la gastojn kaj per sia nombro, kaj per sia aktiveco, kaj per la alta nivelo de Esperanto.



La olimpika stadiono, kun la plej alta klina turo en la mondo

La kulmino de nia intensa programo estis la Zamenhof-festo en la Montreala Esperanto-Domo (spektu videeton pri ĝi: youtu.be/j27dQBc5xM4) : ŝajne, la ne tro granda domo de Normando (prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia) kaj Zdravka (lia edzino) speciale por tiu evento mirakle grandiĝis por bonvenigi 38 entuziasmegajn esperantistojn (kelkaj eĉ veturis el apudaj ŝtatoj de Usono por veni al la festo !) — ĉiuj kun brilantaj okuloj kaj pretaj kunlabori por sukcesigi la UK-on.

La vespero komenciĝis per diskuto pri organizado de

UK. Martin klarigis, kiel oni elektas la kongres-urbon : la decidon faras la estraro (ĉi-foje, kvin personoj, ĉar la du estraranoj el la konkurantaj landoj, Kanado kaj Koreio, sindetenos de la voĉdono). Oni konsideras multajn « tuŝeblajn » faktorojn (ekzemple, kosto de la kongresejo, hoteloj, aviadil-biletoj), sed ankaŭ « netuŝeblajn » faktorojn : ekzemple, kiam la kongreso lastfoje okazis en la regiono, kian efikon la kongreso povus havi sur la E-Movadon en tiu loko, ktp. Multis ankaŭ la demandoj al Clay pri kongres-organizado, ekzemple, prepara kaj dumkongresa laboroj, aŭ la kvanto da bezonataj helpantoj. Laŭ Clay la absoluta minimumo da homoj necesaj en la organiza teamo estas deko, sed ju pli multas la helpantoj, des malpli ĉiuj el ili devas labori : ja ankaŭ volontuloj volas partopreni kaj ĝui la kongreson — kaj la plejparto de la laboro estas bezonata ĝuste dum la kongreso. Ni ankaŭ lernis, ke, se la kongreso estas sufiĉe profita, al la volontuloj post la kongreso oni repagas la kongres-kotizon : jen eĉ plia instigo por helpi dumkongrese !


Ni lernas pri kongres-organizado


La unua kanada interkluba videoponto estis grandega sukceso

Post vigla babilado kaj abunda manĝo, okazis videa ponto (la unuan fojon en la historio de la kanada E-movado!) inter ses kanadaj urboj el tri provincoj : Kebekio (Montrealo), Ontario (Toronto, Otavo kaj Londono), kaj Nov-Skotio (Berviko kaj Halifakso). Joel Amis legis du subtenleterojn de gravuloj : de la montreala urbestro, Denis Coderre, kaj de federacia parlamentano Alexandre Boulerice, el la Nov-Demokratia Partio, reprezentanta la distrikton, kie troviĝas la Montreala Esperanto-Domo. Esperantistoj el aliaj provincoj estis tre feliĉaj, ke Montrealo invitas la plej grandan Esperantan eventon al Kanado, kaj ĉiu grupo esprimis sian subtenon al la montreala kandidatiĝo. La torontanoj estis plej multnombraj post la montrealanoj : 22, kaj ili eĉ preparis kaj legis rezolucion por montri la subtenon al UK en



Estrarano de Kanada E-Asocio, Tamara Koziej, salutas nome de KEA

Montrealo en 2017 (vidu p. 11). Jes ja, la volontuloj neniel mankos, aparte ĉar al kanadanoj aliĝos ankaŭ usonaj esperantistoj ! Mi estis ĝoja vidi samideanojn de aliaj provincoj, kiujn mi ne renkontas ofte pro la vasteco de nia lando, kaj ni decidis fari videopontojn pli ofte : la organizado de la UK estos ankaŭ bona maniero ne nur konatiĝi kun esperantistoj el aliaj landoj, sed ankaŭ por pliproksimigi la esperantistojn en Nord-Ameriko !

Por ĝisrevidi niajn gastojn ni donacis al ili bongustaĵojn el Kanado, kun la nepra acersiropo, kaj du librojn : la ĵus reeldonitajn « Kristnaskajn rakontojn el franca Kanado » kaj la jubilean libron de Esperanto-Societo Kebekio : « 30 jaroj da agado » : « Ĉar ni ja faris ion dum 30 jaroj… » modeste komentis nia nelacigebla prezidanto, Normand Fleury. La ĝisrevido estis kortuŝa. « Mia vizito al Montrealo estis neforgesebla, pro la varmeco kaj gastamo de montrealanoj », diris Clay. Li feliĉis eĉ pri la neĝo, kiu faris la montrealan sperton aparte bela, festeca kaj… aŭtentika !

Ne adiaŭ… sed ĝis la revido, amikoj, en 2017 !

## Kiel vi povas helpi pri UK-on 2017 en Montrealo ?

- Ŝatu nian paĝon en Facebook ! Facebook.com/Montrealo2017
- Helpu al ni traduki kaj plibonigi vikipediajn artikolojn pri Montrealo !
- Aliĝu al nia dissendolisto de helpantoj ! (aliĝu mem al montrealo-uk-2017@googlegroups.com aŭ petu Orlandon Raola, oraola ĉe gmail.com).
- Faru rezolucion de via loka grupo por subteni la kongreson !
- Proponu mem, kion *vi* ŝatus fari !

**Skribu al joelamis ĉe yahoo.com**

Esperanto-Rondo de Toronto

# Rezolucio por subteni la kandidatiĝon de Montrealo gastigi la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en 2017

Ni, la subskribintaj membroj de la Esperanto-Rondo de Toronto,

Diskutinte ĉe nia ĝenerala membrokunsido je la 13-a de decembro 2014 ;

## Konstatinte,

ke la loka Esperanto-movado en Montrealo estas tre vigla, organizinte plurajn sukcesajn kongresojn, kiujn jam ĝuis multaj Torontanoj ;

ke la kultura, kaj aparte lingva, intereseco de Montrealo, kie la lingva demando estas parto de la ĉiutaga vivo, faras Montrealon ideala urbo por Universala Kongreso ;

ke Montrealo estas relative malmultekosta urbo kompare kun aliaj grandaj urboj en nia parto de la mondo kaj estas bonege konektita al multaj mondopartoj per diversaj transportrimedoj, kio farus Universalan Kongreson tie pli atingebla por pli da partoprenontoj ; kaj

ke Universala Kongreso en Kanado estus bonega ŝanco por ĉiuj Kanadaj Esperantistoj kune festi en 2017 la 150-an datrevenon de la konfederacio de nia lando ;

## Deklaras

nian plenan elkoran subtenon al la kandidatiĝo de Montrealo por okazigi la 102-an Unversalan Kongreson de Esperanto en 2017 ; kaj

## Alvokas

niajn membrojn, kaj ĉiujn Esperantistojn kaj subtenantojn de Esperanto en la granda Toronta regiono fari ĉion eblan por helpi al la sukceso de eventuala Universala Kongreso en Montrealo en 2017, kunlabore kun aliaj lokaj Esperanto-organizaĵoj tra Kanado kaj Usono, kaj kun la Esperanto-Societo Kebekia, la Kanada Esperanto-Asocio, kaj Esperanto-USA.

# Konkuro, sed ne konflikto

**Kiel oni bone scias, Montrealo konkuras kun Seulo por la honoro gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto en 2017. Certe, ambaŭ niaj respektivaj organizoj entuziasmas kaj arde kampanjas por sia urbo. Sed la konkuro limiĝas nur al UK en 2017 — ni do sendas niajn plej elkorajn amikajn salutojn kaj bondezirojn al niaj seulaj samideanoj por la nova jaro 2015 !**

Evidentas, ke 2017 estas la plej ideala jaro por UK en Montrealo : Kanado festos sian 150-jariĝon en tiu jaro, kaj Montrealo festos sian 375-jariĝon — datrevenoj, kiuj donos al ni elstarajn okazojn reklami la UK-on kaj Esperanton kunlabore kun urbaj instancoj. Krome, Montrealo neniam gastigis UK-on, malgraŭ sia longa sperto pri kongresorganizado (IJK en 1992, Nord-Amerika Kongreso en 1998, Tut-Amerika Kongreso en 2008, plus la ĉiujaraj regionaj eventoj : Mez-Kanada Renkontiĝo kaj Aŭtuna Renkontiĝo). Aliflanke, Seulo jam havis la honoron gastigi tiun plej grandan eventon de Esperantujo en 1994, kaj UK ne okazis en kontinenta Nord-Ameriko ekde 1984 (okazis kvin UK-oj en orienta Azio dum tiu periodo), kaj UK lastfoje okazis en la orienta flanko de nia vasta kontinento en 1910 ! Do, pro ĉiuj ĉi kialoj, ni kredas, ke la tempo jam venis por UK en Nord-Ameriko ĝenerale, kaj Montrealo specife, kaj 2017 plej taŭgas pro la menciitaj kialoj.



Tio tamen tute ne signifas, ke ni ne volas, ke la revo de niaj seulaj samideanoj realiĝu — tute male ! Ja 2017 perfektas por UK en Montrealo — kaj, laŭ nia scio, ne estas specialaj datrevenoj en Seulo en tiu jaro — sed, fakte, la jaro *2018* estus ideala por UK en Seulo ! Kial ? En februaro 2018 Sud-Koreio gastigos la vintrajn olimpikojn, kaj dum en 2017 la atento de la tuta Sud-Koreio estos fokusita al la preparoj por tiu gravega evento, en somero 2018 la olimpikoj estos jam finiĝintaj kaj ĉio brilos je post-olimpika gloro (kaj kongresanoj povos profiti de la okazo por aĉeti olimpikajn memoraĵojn en la olimpika jaro) !

Nia espero, do, estas, ke UEA konsideros esceptokaze (post du atendeble grandegaj UK-oj en Eŭropo) ŝanĝi sian kutimon kongresi ekster

Eŭropo nur ĉiun trian jaron, tiel ke okazu UK en Montrealo en 2017, kaj en Seulo en 2018. Ni absolute certas, ke ambaŭ niaj urboj, kun la entuziasmo, aktiveco kaj movademo de la montrealaj kaj seulaj esperantistoj, povos organizi tre sukcesajn, amase partoprenatajn UK-ojn !

Ek al UK en Montrealo en 2017, kaj en Seulo en 2018 !

*Komitato por Universala Kongreso en 2017 en Montrealo*



**En la sekva *Riverego* : raporto de Martin Benoit, aktiva ESK-ano kaj nia ambasadoro de bona volo, kiu vizitis la seulajn samideanojn.**

# MeKaRo 2015 en Toronto !

La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) — turisma semajnfino en amikeca etoso — organizita de Esperanto-Societo Kebekia kaj de lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario — okazos la 12-an fojo entute, kaj la 3-a fojon en Toronto, Ontario, de la 16-a ĝis la 18-a de majo 2015.
La MeKaRon por 2015 organizas la Esperanto-Rondo de Toronto.

La retejo mekaro.ca nun estas preta por akcepti aliĝojn kaj por havigi informojn pri la renkontiĝo de 2015. Ĝi jam enhavas plenajn informojn pri loĝado, kaj oni baldaŭ afiŝos plenajn informojn ankaŭ pri la programo.


Se vi jam certas, ke vi ĉeestos la renkontiĝon, ni kuraĝigas vin aliĝi tuj !



# De 1905 ĝis 2015 : la geografio de 100 UK-oj


**Rigardante la informojn pri Universalaj Kongresoj, oni ne povas ne rimarki, ke en kelkaj regionoj UK-oj okazas ne sufiĉe ofte, kaj en kelkaj aliaj... nesufiĉege. La Nord-Amerika kontinento apartenas al tiu lasta grupo. En la tuta granda kontinento okazis nur kvar UK-oj, kaj du el ili antaŭ la jaro 1920 (ĉe la orienta flanko okazis nur unu UK : 1910 en Vaŝingtono, kiun ĉeestis Zamenhof mem). Lastfoje UK en Nord-Ameriko okazis en 1984 en Vankuvero (Kanado). Jen la statistikoj pri UK-oj ekde la komenco (1905) ĝis inkluzive 2015, kaj ekde 1985 ĝis 2015 (t.e., en la lastaj 30 jaroj).**

## UK-oj ekde 1905 ĝis 2015





Eŭropo : 83 ; Orienta Azio : 6 ; **Nord-Ameriko : 4** ; Sud-Ameriko : 3 ; Kariboj : 2 ; Okcidenta Azio : 1 ; Oceanio : 1 . Entute : 100.

## UK-oj ekde 1985 ĝis 2015





Eŭropo : 20 ; Orienta Azio : 5; **Nord-Ameriko : 0 ;** Sud-Ameriko : 2 ; Kariboj : 2 ; Okcidenta Azio : 1 ; Oceanio : 1 . Entute : 31.

## UK-oj ekde 1905 ĝis 2015 : kiuj landoj havis kongreson ?




## UK-oj laŭ la jardekoj : Eŭropo aŭ ne-Eŭropo ?



# Subtenleteroj por UK-2017 en Montrealo



Sinjoro Buller,

Montrealo, ĝia loĝantaro kaj mi mem, estus aparte feliĉaj gastigi la gepartoprenantojn de la Universala Kongreso de Esperanto en 2017. Mi certas, ke vi trovos en Montrealo taŭgan lokon por kongresi kaj interŝanĝi.

Montrealo estas inter la plej malnovaj urboj en Norda Ameriko kaj enhavas amerikajn kaj eŭropajn influojn. Tiel ĝia personeco originalas kaj sukcesis teksi ligojn kun ĉiuj kontinentoj. Urbo kultura, kosmopolita kaj aparte vigla, Montrealo havas bonan reputacion pro ĝia kreemo arta kaj kuirarta.

Urbo de scio, Montrealo havas kvar universitatojn, du franclingvajn kaj du anglalingvajn, kaj esplor-institutojn monde konatajn. Malgraŭ tio ke nia urbo estas internacia metropolo, ĝiaj vizitantoj ŝatas ĝian homan dimension, bonvenemon, vivgajecon kaj la gastamon de ĝia loĝantaro.

Atendante la plezuron scii ke Montrealo gastigos vin, Sinjoro Buller, akceptu miajn plej bonajn sentojn.

Denis Coderre
Urbestro montreala

Estimataj gesinjoroj,

Kiel deputito de la federala distrikto en kiu lokiĝas la Esperanto-Societo Kebekia, mi skribas por apogi la kandidatecon de Montrealo por la organizo de la Universala Kongreso de Esperanto de 2017.

Renkontejo de diversaj lingvoj kaj kulturoj, posedanta mondskalan infrastrukturon kongresan kaj turisman, Montrealo estas la perfekta loko por ricevi ĉi tiun imponan eventon. Mi ankaŭ plene konfidas je la kapablo de la ESK kiel partneroj en la organizo kaj animado de la kongreso.

Cetere, kiel ni rutine faras por lokaj komunum-grupoj, mia teamo volonte disponeblos por peri la trovadon de federalaj programoj celantaj la subtenon de tiaj eventoj.

En la espero de favora decido, respekte salutas,

Alexandre Boulerice
Federacia deputito, Rosemont-La Petite-Patrie



*Red. : tiu ĉi letero aperis originale en la franca* kaj *en Esperanto*

# 15 kialoj por veni al la UK-2015 en Lillo

**De la 25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto 2015 okazos la Universala Kongreso de Esperanto, en Lillo, norda Francio. Tiu UK estos treege vizitinda, pro 15 kialoj :**

**1** Ĉiujare la plej granda Esperanto-kongreso estas la Universala Kongreso, kun ĉiaspecaj kunsidoj, solenaĵoj kaj popularaj programeroj : Malfermo, Fermo, Artaj Vesperoj, Bufedo, Balo, ktp. La UK-2015 estos tiusence tradicia UK...

**2** ... sed, aliflanke, la Universala Kongreso 2015 estos jubilea, 100-a UK ! La jubileo estos diversmaniere festata dum la Kongreso : ekskursoj, kulturaj programeroj, fakaj kunsidoj.

**3** La Universala Kongreso 2015 okazos en Lillo, norda Francio, en la sama regiono, kiel la urbo de la unua UK : Bulonjo-ĉe-Maro.

**4** La gastiga urbo, Lillo, estas eŭropa metropolo, proksima al tri EU-landoj: Belgio, Nederlando kaj Britio, kaj parto de la eŭrometropolo Lille-Kortrijk-Tournai. En 2004 ĝi estis nomita Eŭropa Ĉefurbo pri Kulturo. Tiun jaron venis naŭ milionoj da vizitantoj. La urbo konservis kelkajn el la artaĵoj tiam montritaj.

**5** La urbo Lillo estas facile alirebla : 80 minutojn for de Londono, 60 de Parizo kaj 35 de Bruselo. Ĝi estas atingebla per rapida trajno TGV, per aviadilo, per buso aŭ per aŭto.

**6** Lillo estas tre interesa urbo rilate turismon : muzeoj, bazaroj, verdejoj, kaj multe da historio ! Lillo estas urbo plej agrabla. Laŭ ĝiaj stratoj, la vizitantoj trovas luksajn butikojn kaj butikoplenajn piedstratojn, multajn restoraciojn kaj tipajn tavernojn, art-galeriojn kaj multkolorajn stratbazarojn.



**7** Lillo estas verda urbo : multaj parkoj, ĝardenoj, padoj, kanaloj... kaj eĉ stelforma milita bazejo (vidu la bildon), kiu situas en la verda pulmo de la urbo !

## Dum la UK 2015 estos proponata riĉa ekskursa programo :

8 Ĉiutage estos ekskurso al Bulonjo-ĉe-Maro, laŭ la paŝoj de Zamenhof. Okazos tiam solenaĵoj kun la loka urbestraro, kiuj povos okazi en la urbodomo ; en la urba teatrejo, kie estis inaŭgurita la unua Universala Kongreso de Esperanto ; sur la stacidoma placo Zamenhof, kie staras busto de Zamenhof.

9 Eblos viziti elstarajn muzeojn kaj artejojn en Lillo: ekzemple, la Baseno (*La Piscine,* vidu la malsupran bildon), la Belarta Muzeo : la dua plej ampleksa en Francio, post la Luvro en Parizo.

10 ... kaj estos ekskursoj al vizitindaj lokoj en la regiono : Araso, Amieno, Lens (kie de nelonge situas la muzeo Louvre-Lens, dua establaĵo de la fama pariza muzeo)... kaj eĉ Bruĝo kaj Ipro, en Belgio. Krome, antaŭ-, post- kaj eĉ dumkongrese, eblos viziti aliajn partojn de Francio, la plej vizitata lando en la mondo : Kastelo Greziljono, Luar-kasteloj, Parizo, Provenco.





11 La Kongresejo (vidu la supran bildon), Lillo Granda Palaco, estas moderna konstruaĵo en la urbocentro, malpli ol unu kilometron for de du stacidomoj, Lillo Flandro kaj Lillo Eŭropo.

12 Multnombra estos la partoprenontoj. *Estu vi inter ili,* kontribuu al tio, ke la UK 2015 estu la plej amasa en la 21-a jarcento ! Aparte ni menciu, ke la novuloj estos diligente kaj pli zorgeme ol kutime akceptataj kaj helpataj dum la Kongreso dank' al sistemo de Anĝeloj.

13 La kultura programo estos aparte bunta kaj altnivela : koncertoj, teatraĵoj, ekspozicioj. Inter la koncertoj spekteblaj estos famaj, kaj malpli famaj, francaj kaj internaciaj artistoj. Estos grandega nacia vespero por ekkoni la nordfrancian kulturon kaj kunvivi grandajn emociojn !



**14** La UK estos malfermata al la ekstera publiko : pluraj kulturaj eventoj estos aranĝitaj en la urbo mem, ekz. en Lillo-plaĝo, kiel spektakloj, ekspozicioj...

**15** Eblos en Lillo frandi bongustan francan kaj lokan gastronomion : vafloj kaj aliaj dolĉaĵoj, bieroj, flandra *carbonade* (specialaĵo kun bova viando kuirita en biero), *waterzoï, potjevleesch*, diversaj fromaĝoj, alkoholo « genièvre » (juniperbrando), mituloj kaj frititaj terpomoj...

Do, ĉial, aliĝu, venu, partoprenu al la 100-a Universala Kongreso en Lillo 2015. Bonvenon al Lillo-2015 ! www.lille2015.fr

*La artikolo originale aperis en la decembra numero de la revuo* Esperanto *(kun kelkaj redaktaj ŝanĝoj).*

## Dank' al ESF... kaj *via* subteno !

186 000+ registritaj uzantoj ĉe Lernu.net

823 lerniloj kaj 81 000+ elŝutoj ĉe Edukado.net

45 jaroj de NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro)

4.675.412 vortoj en Tekstaro.com

16 lingvoj: subtitoloj en Esperanto-videokurso Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo

6 Nitobe-Simpozioj


**Tiuj ĉi projektoj ricevis subvencion de ESF, kiu ekzistas dank' al *via* subteno. Donacu al ESF rete (esperantic.org/donacoj) aŭ per UEA: esfo-p. Elkoran dankon !**

ESF

# « Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado » : papere kaj elektronike !

### Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado de Louis Fréchette, 2-a eldono, Montrealo, Esperanto-Societo Kebekia, 2014

« Jen Esperanta eldonaĵo praktike perfekta. Bela libro maldika, nur 130-paĝa, sed sur ĉiuj paĝoj videblas fortostreĉo por atingi la perfektecon. Papero bona, tipografio neta. » — oni skribis en la novembra numero de *La Gazeto* : « … Francisko Lorrain ne kontentiĝis pri la kiel eble plej perfekta tradukado de la teksto de Fréchette ; li nenion neglektis por vivigi la tekston per ilustraĵoj kaj mapoj. Ĉi lastaj, kreitaj per profesiula precizeco de François Girard, provokas mian admiron; ili estas desegnitaj laŭ 19-a-jarcentaj donitaĵoj kaj perfekte reliefigas la lokojn gravajn en la teksto de Fréchette, por kiu ili estis faritaj. » (Legu ĉe la retejo de ESK, esperanto.qc.ca, la [plenan version de la recenzo](plenan version de la recenzo).)




La lasta eldono de tiu bela libro de Louis Fréchette, zorge tradukita kaj redaktita de Francisko Lorrain, estas nun havebla papere aŭ elektronike ! La kosto de la papera versio estas 24 kanadaj dolaroj (plus sendokostoj), kaj 14 kanadaj dolaroj por elektronika versio. La libro aĉeteblas per ESK (esperanto.qc.ca) aŭ ankaŭ per aliaj libroservoj (elektronikaj libroj baldaŭ haveblos per FEL, Esperanto-USA kaj ESK : esperanto.qc.ca).

**Pliaj informoj :** francisko.lorrain [ĉe] mac.com



# Tra la Norda Lando

*Yevgeniya (Ĵenja) Amis*

***Nous avons parcouru plus de 10 000 km pour rencontrer au Japon un autre Montréalais : Ugo José Lachapelle. Avec lui, nous avons enseigné l'anglais dans une école, nous avons cuisiné pour 50 personnes, nous avons pris un bain dans un « onsen » ; nous avons vu des singes sauvages et un village unique avec les toits en chaume, et tout le temps nous avons apprécié le magnifique paysage de la préfecture de Toyama dans la région de Hokuriku : « la Terre du Nord ».***

**Mia edzo kaj mi vojaĝis pli ol 10 000 km, al fora Japanio, por konatiĝi kun alia montreala esperantisto : Ugo José Lachapelle, aŭ Esperante — Juhelo. Kun Juhelo, ni helpis instrui la anglan en japana lernejo, kuiris ukraine por kvindeko da homoj, baniĝis en varmaj fontoj, vidis simiojn en la naturo, vizitis unikan vilaĝon kun altegaj pajlaj tegmentoj, kaj la tutan tempon ni ĝuis la belegan montaran pejzaĝon de Tojama-gubernio en la regiono Hokuriku — « la Norda Lando ».**

Juhelo estas partoprenanto de la programo JET : *Japan Exchange and Teaching Programme,* kies celo estas doni al japanoj, ofte en kamparaj lokoj, la eblon konatiĝi kun alilandanoj, kaj plibonigi la scipovon de la angla en la lernejoj. La plejparto de « JET-anoj » laboras kiel anglaj help-instruistoj en lernejoj, sed kelkaj — kiel Juhelo — laboras en la urbodomo kiel respondeculoj pri internaciaj rilatoj : laboro, kiu postulas aparte bonan konon de la japana lingvo. Altega kaj blonda, tute ne

simila laŭ la aspekto al orient-azianoj, Juhelo ofte surprizas japanojn per sia rego de la japana. « Vi parolas ĝin pli korekte ol miaj propraj infanoj ! », ni aŭdis unu fojon de japana esperantistino, kiu miris pri lia nivelo en la japana.

Aldone al multaj taskoj de sia laboro pri internaciaj rilatoj en la urbodomo de la urbeto Kurobe, prelegoj kaj gvidado de diversaj aktivaĵoj, tiutempe Juhelo ankaŭ instruis la anglan lingvon en lernejo. Dank' al lia invito, ankaŭ ni povis sperti unu tagon en la vivo de la anglalingva helpinstruisto.


Juhelo kaj s-ino Nakamura

## My name is Ugo !

Ni alvenas al la lernejo en la pluva griza tago de novembro, je la 8:30 — la alventempo de instruistoj. Mi tuj konstatas, ke ĉiuj aliaj instruistoj alvenis pli frue kaj laboras en la komuna instruista ĉambro jen ĉe la komputiloj, jen farante notojn en la taglibroj. Inter nia alventempo kaj la komenco de la lecionoj estas preskaŭ unu horo — la tempo por rapide priparoli la jam fiksitan programon de la leciono kun la ĉefa instruistino pri la angla, sinjorino Nakamura. (La libereco de help-instruistoj, kiel Juhelo, estas sufiĉe limigita : ili devas sekvi la jam difinitan instruprogramon, je ĉagreniĝo de Juhelo, kiu pensas, ke la lingvoinstruado en Japanio estas tro rigida.) La ceteron de la tempo ni kafumas, babilas kun s-ino Nakamura kaj simple nenifaras, atendante la komencon de la klaso. En la okuloj de Juhelo mi legas « mi preferus dormi pliajn 45 minutojn : alveni dek minutojn antaŭ la klaso estas tute sufiĉe. » « En Japanio oni laboras pli longajn horojn ol en la okcidento, sed malpli koncentrite, kun multaj etaj paŭzoj — ja ankaŭ ĉeesto kalkuliĝas kiel laboro », diris iam japana amiko, kiu longe loĝis ankaŭ en Okcidenta Eŭropo.

Ekzakte je la 9:25 al la instruista ĉambro alvenas du ĉarmaj okjaruloj. Ili jam scias, ke venos du gastoj, sed, vidante nin persone, ili fariĝas eĉ pli timidaj, kaj preskaŭ forgesas la ĉiaman formulon por bonvenigi la anglalingvan instruiston. Post la kuraĝigo de Juhelo ili retrovas la perditajn vortojn : « Please come to our class… », ili diras mallaŭte. Tiu knabo kaj knabino estas respondeculoj de la klaso por tiu ĉi tago, klarigas al ni Juhelo, kaj unu el iliaj taskoj estas inviti la

anglan instruiston al la klaso.

Dum ni supreniras, miaj dentoj klakas pro la malvarmego en la koridoroj — eĉ kun du puloveroj — kaj mi mense kompatas la bazlernejanojn, kiuj portas leĝerajn ĉemizojn eĉ vintre, kun ŝortoj. Mi trovas strange, ke preskaŭ ĉiuj japanaj konstruaĵoj, ankaŭ lernejoj, estas konstruitaj por somero, ne por vintro, eĉ en tiu norda parto de la lando : la konstruaĵoj ne estas bone izolitaj kaj ofte mankas la centra hejtado. (Kelkajn monatojn pli frue mi kompatis mezlernejanojn, kiuj en pli ol 30-grada varmego de eksterordinare varmaj tagoj de oktobro suferis en tre peza vintra lana uniformo : reguloj estas reguloj, kaj oni ŝanĝas uniformon nur dufoje jare — komence de somero kaj komence de aŭtuno — kaj ĉiuj faras tion samtempe !)



*My name is Ugo !*

« Good morning, class! » diras Juhelo. « GOOD MORNING, LACHAPELLE-SENSEI ! HOW ARE YOU ? », diras la infanoj, ĉiuj kune. « I'm sleepy » (« Mi estas dormema »), li diras sincere. « Let's start our class ! » diras Juhelo la komencan ritan frazon. La tuta klaso ĥore respondas : « LET'S START ! » Post kelkaj pliaj ritaj demandoj (tago, tempo, vetero), al kiuj ĉiuj infanoj respondas kune, sekvas la temo de la tago : sinprezento. « My name is Ugo ! », diras Juhelo, « Kaj nun vi ! » « MY NAME IS UGO !!! », respondas la infanoj samtempe. « Ĉu vere ? » demandas la instruisto ridetante. La infanoj iomete embarasiĝas, ĝene ridetas kaj je la dua provo ĥore ripetas la saman frazon, ĉi-foje jam anstataŭigante *Ugo*-n per sia propra nomo. « I like eggs ! » « I LIKE EGGS ! » — respondas la plejparto (kvankam kelkaj kuraĝuloj anstataŭigas « *eggs* » per aliaj manĝaĵoj). « I play ice hockey ! » Ĉi-foje la infanoj estas plej kreemaj, ja hokeo estas tute nekonata en Japanio : « I play baseball ! » « I play football ! » « I play tennis ! » « I play



Ekzercado de manpremo

swimming ! ». Japanaj infanoj estas aktivaj en diversaj sportoj, kaj por la momento ne gravas, se iuj faras eraretojn, gravas, ke la infanoj parolu angle.

Ni diras kelkajn vortojn pri ni, kaj poste la infanoj vice prezentas sin. Nia tasko estas aŭskulti la sinprezentojn de ĉiu infano kaj poste manpremi post « nice to meet you », por instrui tiun gravan parton de okcidenta kulturo, fremda kaj foje iom embarasa por multaj japanoj. Fine de la klaso la infanoj japanlingve dividas siajn impresojn pri tiu ĉi leciono : ili ĝojis havi la gastojn kaj iomete lerni pri ni.

La leciono kun pli aĝaj infanoj sekvas la saman formulon kiel kun pli junaj, kun nur kelkaj ŝanĝoj : anstataŭ prezenti sin, la infanoj prezentas unu el siaj samklasanoj, ili lernas kelkajn novajn nomojn de bestoj kaj ekzercas sin en la prononcado : la infanoj kun plezuro ripetas post Juhelo « TIGEEER », « BIIIRD », « TUUUURTLE », ili estas aparte bonaj pri la prononcado de la malfacila angla « ER »-sono. Tamen, je nia surprizo, ili ŝajne ankoraŭ ne regas la latinan alfabeton kaj en la kajeroj ili notas la dirotajn frazojn per *katakana* — japana silabaro por fremdlingvaj vortoj, kiu tamen tute ne taŭgas por transdoni la prononcon de la angla lingvo.

Kiam la infanetoj invitis nin al sia klaso, ili ja ne troigis : la klaso en japanaj lernejoj vere « apartenas » al infanoj, ne al la instruisto (la instruistoj okupas apartan, tre grandan instruistan ĉambron) : la infanoj ornamas siajn ĉambrojn per desegnaĵoj kaj aliaj artaĵoj, kaj ankaŭ purigas ĝin — fakte, la infanoj respondecas pri purigo de la tuta lernejo : tio helpas instrui ekde frua aĝo respondecon kaj respekton al ĉiu laboro, kaj ankaŭ instigas trakti la lernejon kun zorgemo. Ni estis invititaj dividi la tagmanĝon kun infanoj kaj instruistoj, kaj tre surprizis min, ke ĉiuj komencas kaj finas manĝi samtempe, ke la infanoj preskaŭ ne parolas dum la manĝo, kaj ke tuj post la manĝo la infanoj volonte helpas ordigi la tablojn kaj meti la telerojn kaj manĝilojn en la telerlavilon. « Kiaj bonkondutaj infanoj ! » — ni ne povas ne miri.

## Kuiri ukraine, prezenti trilingve !

S-ino Nakamura lasas Juhelon foriri iom pli frue, ĉar ni devas jam rapidi por la sekva aktivaĵo en la plena tagordo de la respondeculo pri internaciaj rilatoj : komuna kuirado en la urba kulturcentro — laboro, kiun Juhelo devas plenumi plurfoje en la jaro. Ofte temas pri temaj manĝoj por aliaj JET-anoj, la help-instruistoj pri la angla el diversaj landoj, aŭ pri diversaj festoj : Kristnasko, Pasko, Ĥanuko, ktp. Kebekiano, Juhelo ne povis maltrafi la okazon festi la faman kebekian tradicion manĝi acer-siropajn bongustaĵojn en marto, la tempo de ekfluo de acera suko, per abunda kebeki-stila manĝaĵo kun la nepraj patkukoj kun acersiropo. Speciale por nia vizito, Juhelo invitis min gvidi la kuiradon de ukrainaj pladoj. « Sed ĉu eblas aĉeti ĉion en Kurobe? » — mi demandis kun malkredo, kiam Juhelo proponis tiun ideon antaŭ iom da tempo. « En Kurobe eble ne, sed en Japanio ĉion eblas aĉeti per la interreto ! Eĉ bagelojn por Ĥanuko ! », li klarigis. En tiu granda laboro, Juhelo ludas la rolon de la dirigento : li ja devas elekti la teman manĝon, kolekti la helpantojn, informi pri la komuna manĝado en ĵurnaloj (ĉar la evento estas tute publika, kaj kiu ajn povas veni), aĉeti ĉiujn ingrediencojn, helpi dum la kuirado, prepari kulturan programon kaj, plej grave, certigi, ke oni ĝuas kaj la kunlabron kaj la feston ! « Mi neniam povus fari tion, kion vi faras ! », mi diris al li sincere, nervoziĝante pri la kuirado por kvindeko da homoj : la unuan fojon en mia vivo mi devas kuiri por tiom da homoj !


Laboro facilas kun bonaj helpantoj !

Mia nervozeco poiomete foriras, kiam mi vidas la dekon da helpantoj : la « magiistoj », kiuj alvenas speciale por helpi al ni senŝeligi terpomojn, tranĉi legomojn kaj friti kievajn kotletojn. Dank' al la laboremo kaj lerteco de niaj japanaj helpantoj kaj la talentoj de Juhelo samtempe helpi kuiri, interpreti kaj igi ĉiujn senti sin bone, kaj la kuirado kaj la manĝado mem estis enorma sukceso. Ni faris tri prezentaĵojn : pri Ukrainio, pri Kanado, kaj Joel prezentis sian naskiĝŝtaton : Georgion. Oni

konas Georgion en Kurobe, ĉar ĝi estas ĝemel-urbo de la urbo Macon [mejkon] en Georgio, kaj ĉar la usona prezidento Jimmy Carter, el Georgio, mem vizitis Kurobe-n antaŭ trideko da jaroj. Ni surpriziĝis eĉ trovi sur la muro en la lernejo de Juhelo gazetan eltranĉaĵon kun la foto de Carter : vizitinte Kurobe-n, li inaŭguris maratonon, kaj ekde tiam la maratono Carter okazas en la urbo ĉiujare jam dum la lasta trideko da jaroj. Joel kun plezuro transdonis salutojn de Macon (ĉar li naskiĝis relative nemalproksime de ĝi), je la granda plezuroj de lokanoj.


La vido de la onseno estis spirprena


La virina parto de la onseno

Nia prezentaĵo estis unika, ĉar ni faris ĝin trilingve : Esperante, kun posta japana traduko de Juhelo kaj la angla traduko de Joel. Kaj la japanoj, kaj la JET-instruistoj, ĉefe anglalingvanoj, havis tre bonan impreson pri Esperanto, kaj multe demandis pri nia lingvo. Kurioze, la sola persono, kiu ne tre bone reagis, estis ne anglalingvano, sed mezaĝa japano, kiu tre bone regas la anglan lingvon, kaj kiu neniel volis akcepti la ideon, ke povas esti iu alia internacia lingvo ol la angla… Tio ne tute surprizis Juhelon, ja se oni malkovrus, ke estas alia internacia lingvo, kaj multe pli facila, ol la angla, oni pensus, ke oni malŝparis sian tempon studante la anglan…

## Varmaj fontoj

Mallonga trajna veturo en la montaron, kaj jen ni alvenas al la urbeto de varmaj fontoj, Unazuki-Onsen, kiu renkontas la alvenintojn per fontano kun varmega akvo tuj ĉe la stacidomo. Bluega akvo de la riveroj kaj lagetoj, altaj ruĝaj pontoj super la valoj kaj rapidaj montaraj riveroj, la multkoloraj aŭtunaj folioj kaj la altaj montoj kun neĝaj kapoj en la fono aspektis kiel pejzaĝo de bela pentraĵo, kaj ne kiel io el la vera vivo.

Ni alvenas al onseno (varmega fonto) : tute malsekiĝintaj de kombinaĵo de pluvo kaj

degelanta peza novembra neĝo, ni trovas eĉ pli da plezuro malstreĉiĝi en varmega akvo kaj senti la neĝon fali sur niajn harojn. Tre amuzis (sed ankaŭ iom embarasis) mian edzon, ke dum li kaj Juhelo baniĝis en la vira sekcio de la onseno, tute senĝene, venis la prizorgistino : kontrolinte la temperaturon de la akvo, ŝi foriris, tute neĝenita per la ĉeesto de nudaj viroj.

Revenante hejmen, ni rimarkas kelkajn simiojn, la ĉarmajn japanajn makakojn : nihon-zaru. Unu simiino, kun eta simiido surdorse, atente rigardis nin, kaj ni, same atente, por ne timigi la bestojn, fotis. La japanaj simioj — aŭ « neĝaj simioj »,



estas la solaj simioj, kiuj kutimas al neĝo kaj la malvarma klimato de nordaj partoj de Japanio. Kaj same kiel homoj, ankaŭ la japanaj simioj ĝuas sidi en varmaj fontoj : en kelkaj lokoj oni eĉ povas dividi onsenon kun simioj !

## Gokajama : la kvin valoj

Aparte memorinda estis nia vizito al la historia vilaĝo Ainokura en la monteca regiono Gokajama, kiu signifas « Kvin valoj ». Ainokura estas fama pro siaj krutaj pajlaj tegmentoj (Gaŝŝoo-zukuri), kiuj



formas preskaŭ egalflankan triangulon — necesaj por elteni la pezegan akvoplenan neĝon, tiom abundan en tiu ĉi regiono. Sufiĉe kutimaj dum la Edo-periodo kiel domoj de ordinaruloj (farmistoj, komercistoj, metiistoj), en la tuta Japanio restis nur tri historiaj vilaĝoj, kie oni ankoraŭ povas trovi tiajn domojn, kaj du el ili troviĝas en Gokajama. La plejparto de la domoj estas inter cent kaj ducentjaraj, kvankam la plej malnova domo en Ainokura havas kvarcent jarojn (la tegmentojn oni tamen ŝanĝas ĉiujn 15-20 jarojn). Atestantoj de la homa elpensemo, tiaj domoj estas faritaj ne nur por elteni severan japanan vintron, sed ankaŭ por havi belan kaj spacoplenan loĝejon.

Ĉiuj vizitantoj al Ainokura ricevas mallongan

gvidlibron pri la bona konduto en la vilaĝo : ĉar ĝi ja ne estas simpla turista allogaĵo — kvankam ĝi havas gastejojn kaj muzeojn, ĝi tamen estas loko, kie daŭre vivas kaj laboras homoj, kies privatecon oni devas respekti. La unua regulo en la listo estas, kompreneble, neniu fumado en la vilaĝo : ja la pajla tegmento estas facile ekflamebla. Tra la tuta vilaĝo oni povas vidi la reton de akvotuboj, por ke oni povu rapide estingi la fajron, se unu el la pajlaj tegmentoj ekbrulos. La vilaĝo estas proklamita monda heredaĵo de Unesko, kaj ĝi fieras, ke la reĝa princo dufoje restis en tiu loko.



## Ĝis revido, la Norda Lando !

« Ĉu vi iam estis en karaoke-ejo? », demandis nin Juhelo. — « Ne?! Ni nepre korektu tion, ja ankaŭ karaoke-ejoj estas grava parto de la japana kulturo ! » Mi imagis karaoke-ejon iom pli kiel komunan spacon en drinkejo. Kvankam, certe, ekzistas tiaj, la plej tipaj japanaj karaoke-ejoj estas konstruaĵoj kun pluraj simplaj sonizolitaj ĉambretoj por enteni ĝis ses personoj, kun frape kolorigitaj muroj, kun ekrano kaj aparato por elekti milojn da japanaj kaj nejapanaj kantoj. Oni povas lui la ĉambron por horo aŭ pli, kaj oni ne devas havi ses personojn por iri tien — oni povas esti eĉ tute sola, se oni volas simple iom malstreĉiĝi kantante. Unu esperantisto eĉ rakontis, ke ilia loka E-grupo renkontiĝis en karaoke-ejo, simple por havi privatan, ne tro multekostan spacon por lecionoj kaj babilado. Ni kantis preskaŭ tutan horon, kaj Juhelo konfesis la sekreton de sia perfekta prononco de la japana : multe da kantado ! ☺

De Kurobe ni foriris kun la plej nekredeblaj memoroj pri tiu bela loko, kun plej bluaj riveroj kaj neĝokovritaj altaj montoj, kaj, plej grave, kun la sento, ke, konatiĝinte kun Juhelo, ni kvazaŭ retrovis malnovan amikon, nian samurbanon de Montrealo, kun kiu ni, dank’ al Esperanto, konatiĝis en la Lando de Leviĝanta Suno !


# Vojaĝo al pacifika marbordo

## *Martin Benoit*

***Martin et Yvan Denys ont voyagé sur la côte ouest du Canada et des États-Unis. Martin décrit ce voyage, au cours duquel ils ont participé au cours d'espéranto NASK, à Victoria, et visité Vancouver et San Francisco, où ils ont rencontré des espérantistes sur leur chemin.***

Kiam mi eksciis, ke NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) okazos en Viktorio, mi proponis al mia koramiko Yvan Denys partopreni la kursaron. Li ne tiom entuziasmis, sed li ja promesis al amikoj en Rejkjaviko, ke li flue parolos Esperanton por la UK-2015 en Lillo. Kiam mi sugestis, ke oni povos vojaĝi poste al San-Francisko, li tuj jesis pro ĝojego, ĉar viziti la urbon estis revo por li dum jaroj. Tiel komenciĝis la organizado de freneza kaj belega vojaĝo, al kiu aldoniĝis survoje tritaga ekskurso al Vankuvero !

Amikino mia, kiu loĝas en Viktorio, proponis al ni loĝi en ŝia domo senpage (fakte, domego, ĉar ĝi enhavas dudekon da ĉambroj !). Kiam ni alvenis al la flughaveno de Viktorio, ŝia kunloĝanto (tre simpatia kostarikano, kiu venis al Kanado por studi) iris renkonti nin tie kaj venigi ĝis la domo. La postan tagon ni aŭtis ĝis la Universitato de Viktorio, kie okazis la kursaro. La universitata kampuso estis tre bela ! Ni estis iom malfruaj, kaj ni ne trovis tuj la ĉambron ; bonŝance, ni renkontis hazarde esperantiston por gvidi nin al la ĝusta loko. Mi do sekvis la superan kurson, kaj Yvan Denys tiun de la komencintoj. Mi tre ŝatis la kurson : István Ertl estas tre lerta esperantoparolanto, kaj klarigas tre bone pintajn gramatikaĵojn. Kiel hejmtaskojn ni devis verki eseojn, kaj István korektis ilin. Mi neniam tiom verkis



Yvan Denys multe laboris dum NASK !

Esperante dum unu semajno !

Yvan Denys havis kelkajn problemojn : li ne multe studis kaj lernis la lingvon ĝis nun, kaj la kurso estis iom tro altnivela por li. Post kiam li klarigis al mi sian ioman frustriĝon, mi decidis paroli kun Liĉjo Miller, unu el la organizantoj, por ekscii, kiel eblas helpi. Liĉjo estis tre helpema : li parolis kun Ĵenja Bondelid, la instruistino, kaj ĉeestis la kurson por helpi la instruistinon kaj la klasanojn. Yvan Denys poste konstatis pliboniĝon de la kurso, kaj li multe lernis, kvankam lia cerbo bolis kelkfoje ! Tamen li havis mian helpon, kaj ankaŭ helpon de nova amiko, Joshua de Portlando, kiu ankaŭ partoprenis la kurson.


Sed ĉiu laboro indis la penon : jen feliĉa momento de diplomiĝo !

Mi ĝoje revidis amikojn, kiel Davidon el Meksiko, kiu partoprenis en TAKE-7 en Montrealo, kaj mi renkontis novajn amikojn, kiel Joshua de Portlando. Joshua, Yvan Denys kaj mi facile amikiĝis kaj ofte estis kune dum NASK. Ni konversaciis trilingve (angle, france, Esperante), promenis plurfoje kune en la urbo, kaj eĉ trilingve bierumis en drinkejo de Viktorio ! Ni ankaŭ festis la Kanadan Tagon antaŭ la parlamentejo, ni vizitis la belan urbocentron, la nuran gejan drinkejon, la papilian ĝardenon kaj *The Butchart Gardens*, mirindan kaj belegan botanikan ĝardenon ! Je la fino de NASK okazis la diploma ceremonio. Ni ĉiuj tre fieris pri la honora rikolto post multa strebado dum la kurso. Ni ĉiuj ĝisis unu la alian, kun iom da malĝojo, sed kun espero revidi unu la alian iam en la estonteco. La venontan tagon jam estis la ekiro, kaj ni foriris de la domego ĝis la haveno por ŝipi al Vankuvero.

Tre plaĉis al ni la trihora ŝipado per pramo de Viktorio ĝis Vankuvero, kun belegaj pejzaĝoj. Alveninte al la hotelo Sandman meze de la geja kvartalo, ni konstatis, ke nia ĉambro estas kvazaŭ apartamento, kun lavmaŝino, forno, fridujo ktp ! Tio estis vere oportuna ! Dum la tritaga, sed tamen tro mallonga, restado ni vizitis kelkajn gejajn drinkejojn, ni marŝis multe laŭ la Angla Golfeto kaj en la Parko Stanley ; ni vizitis la








Vankuveran Akvarion kaj la ĉinan kvartalon. Ni vespermanĝis kun Arono kaj Karlina, kiujn mi ekkonis, kiam ili loĝis en Otavo, kaj kiujn mi ne vidis de multaj jaroj (tial mi ege ĝojis revidi ilin !), kaj Davido de Vaŝingtono, ĉe bonega restoracio ĉe la Angla Golfeto, kun vido al la sunsubiro ! Poste ni promenis laŭ la golfeto, manĝante dolĉan glaciaĵon, kaj bierumis ! Tre ĝuinda vespero !

Jam estis tempo aviadile veturi ĝis San-Francisko ! Nia gastejo estis tri stratojn for de la strato Castro, la ĉefstrato de la geja kvartalo. Ni, kompreneble, multe vizitis Castro-n, ĝiajn drinkejojn, bonegajn restoraciojn (mi pensis, ke Montrealo estas la plej bona restoracia urbo en la mondo, sed mi devas konfesi, ke San-Francisko estas eĉ pli bona !).

Ni multe uzis la publikan transporton kaj ege ŝatis ĝin ! La metrosistemo estas aparte bona : la trajnoj iras subgrunde laŭ la strato Market kiel metroo, sed poste la vagonoj eliras surteren kaj funkcias kiel tramoj ! La malnovmodajn tramojn sur strato Market kaj laŭ la haveno mi ankaŭ ege ŝatis ! Antikvaj tramoj el Italio, Usono, Kanado kaj aliaj landoj rulis en la urbo ! Estis kvazaŭ sperti vivon antaŭ pluraj jardekoj ! Kaj, kompreneble, ni uzis la kablotramojn, la plej malnovan publiktransportan sistemon en la mondo ! Ni atendis pli ol unu horon por entramiĝi, sed la sperto valoris la atendon ! Ni vizitis la kablotraman muzeon kaj lernis multe. La kablotramoj ne havas motoron : ili nur havas pinĉprenilegon, kiu pinĉas la subgrundan moviĝantan kablon. Sub la muzeo estas kvar grandaj motoroj, kiuj movas la kablojn subgrunde. Tio estas tre oportuna rimedo por San-Francisko, ĉar ĝiaj stratoj estas tre deklivaj !

Ni vizitis la ĉinan kvartalon, la plej ampleksan ekster Ĉinio ! Estis kvazaŭ ni ŝanĝus landon. La Fiŝkaptista Elŝipejo (Fisherman’s Wharf), granda kajo kun multaj komercejoj kaj restoracioj, kaj kun




ege multaj turistoj, kiel ni ! Estas ĉe ĝi ankaŭ akvario : la plej bona, inter tiuj, kiujn ni spertis ! Ni trairis la vitran tunelon, kiu ebligis al ni vidi diverstipajn fiŝojn kaj marbestojn, ĉirkaŭvolvante nin per oceana etoso. Ni iris al la strato Lombard, la plej dekliva strato en la mondo ! Ĝi estas tiom kliniĝanta, ke la aŭtoj devas veturi tra multaj kurboj (vidu la bildon). Ni vizitis ankaŭ la turon Coit kaj la muzeon Exploratorium, kiu ebligis al ni fizike sperti centon da fizikaj kaj sciencaj fenomenoj per multaj maŝinoj, tuŝeblaj por sperti diversajn efikojn. Ni ege ŝatis ĝin, kaj ni sentis nin kiel malkovrantajn infanojn ! Kaj, kompreneble, ni ĝuis ankaŭ la Pacifikan Oceanon ! Ni decidis lui biciklon ĝis la Ora Ponto (Golden Gate Bridge). Mi jam longan tempon ne biciklis, tamen mi alkutimiĝis sufiĉe rapide. La stratoj estis, kompreneble, tre deklivaj ; kelkfoje ni devis grimpi supren kun la biciklo flanke ! Ni alfrontis la ventegojn sur la fama ponto. Ni ripozis trans la ponto, kaj poste reiris ĝis Fisherman's Wharf por redoni la biciklon. Estis agrablega promenado, kvankam elĉerpa !

Ni renkontis plurfoje Steĉjon Schwichow, kiun ni vidis dum NASK ! Tre simpatia homo. Ni unue renkontiĝis en teejo, kie li pruntedonis al ni turisman gvidlibron kaj indikis la vizitindajn lokojn. Kelkajn tagojn poste ni vespermanĝis en itala restoracio kun Steĉjo kaj aliaj esperantistoj de la urbo. Kaj, ĉe la fino de nia vojaĝo, ni vespermanĝis kun li kaj lia koramiko en ĉina restoracio. Li eĉ invitis nin gasti ĉe li dum eventuala plia vojaĝo al San-Francisko !

Kaj jen intense finiĝanta vojaĝo ! Ni ege ĝuis sperti la etoson de la pacifika marbordo, kie mi sentis, ke la homoj estas pli konservemaj rilate la medion. Mi ege ĝuis sperti tiujn urbojn, kun iliaj mirindaĵoj. Esperanto estis kerna sperto dum nia vojaĝo ; ni plibonigis nian Esperanton per kurso en Viktorio, kaj amikumis kun esperantistoj en ĉiu urbo. Esperanto donis al ni spertojn, kiujn ni ne povus sperti kun aliaj lingvoj. Nia vojaĝo estas plia pruvo, ke Esperanto estas internacia paca lingvo, kaj ke ĝi kontribuas al la plibonigo de la mondo.

# La ĉaka milito

*Francisko Lorrain*

***La guerre du Chaco entre la Paraguay et la Bolivie, de 1932 à 1935, fut terrible. Elle se termina par un armistice et une conférence de paix dans laquelle s'impliquèrent plusieurs pays. Un témoin raconte comment les combattants des deux côtés vécurent la fin de ce conflit.***

Tio estas milito okazinta inter Paragvajo kaj Bolivio dum la jaroj 1932–1935 en pridisputata regiono nomata hispane « Gran Chaco » [gran ĉako] inter la du landoj. Publikiĝis kolekto de atestaĵoj pri tiu milito, titolita *La ĉaka milito (Frontbatalintoj rakontas)*. Redaktis ĝin en la germana Kornelius K. Neufeld, menonito. En tiu regiono loĝis multaj menonitoj, inter kiuj estis s-ro Neufeld. Esperantigis la libreton 44-paĝan Victor P. Epp. Ne estas indiko de jaro, kopirajto aŭ eldonanto. La milito, ege mortiga, kun tranĉeoj, finiĝis per batalhalto la 12-an de junio 1935, post kio diversaj landoj estis petitaj kune arbitracii la konflikton, kio kondukis al daŭra paco. Jen tre kortuŝa elĉerpaĵo el atestaĵo de *paragvaja* partopreninto de tiu milito. Mi citas laŭlitere.




Proksimuma situo de la regionego Granda Ĉako (Vikipedio)

« Sinsekvis la 11-a, la 12-a kaj la 13-a kaj ankaŭ la 14-a de junio, kaj ĉiutage la batalo iĝis ankoraŭ pli amara.* Tiam, la 14-an junion, je la 11-a horo antaŭtagmeze, okazis subite masakra pafaro de ambaŭ flankoj. Estis la infero. Ni neniam spertis tian kanontondron, tian mitralpafadon. Estis kvazaŭ ĉiuj demonoj ekliberiĝis, tiom furiozis la batalo.

[…]

« Tiam subite ĉio silentiĝis, alvenis nereala, fantoma silento. Estis la 14-a horo de la 14-a junio 1935, kaj la armiloj silentis por ĉiam.

« Kial nur nun ? Kial ? Kial ne jam la 12-an junion, kiam oni subskribis la armisticon ?

« Kial ? Kial ?

« Kiu revivigos tiom da mortintoj tie sur kampo ? Kiu nedifektigos kaj nevundigos tiom da vunditoj kiuj plendas tie sur la batalkampo ? Kial ni devis ankoraŭ hodiaŭ ekscitigi tian inferfajron dum tri horoj ?

[…]

« Kaj tiam tondris ordono super la batalkampo, ‹ Kolektu la armilojn ! › Ni ĉiuj kuris kaj kolektis niajn armilojn sur la frotpoluritan pafkampon antaŭ niaj tranĉeoj.



Paragvajaj soldatoj en Fortin Alihuatá, 1932 (Vikipedio)

« Kaj tiam ni aŭdis ĝojkriadon sur la alia flanko. Neniam en la vivo ni iam ajn aŭdis ion similan. La bolivianoj, niaj malbonaj malamikoj, sturmis kaj faletis el siaj tranĉeoj en nian direkton. Ili saltis super niaj baraĵoj kaj elfosaĵoj kaj kuris al ni kaj ĵetis sin ĉirkaŭ niajn kolojn kaj sur niajn brustojn ; soldatoj, viroj, oficiroj, ĉiuj subite alvenis nian flankon. Ni interbrakumis, ploris kaj ĝojkriis. La milito finiĝis ! La milito estas finita !

« La bolivianoj donis kokaon kaj panon kaj ladviandon kaj tion kion ili kapablis trovi al ni. Ĉu la milito de pli ol tri jaroj estis vere necesa ? »

Jes, ĉu ĝi estis vere necesa ?




Poŝtmarko dediĉita al la Ĉaka paco (Paragvajo)

* Malgraŭ la batalhalto subskribita la 12-an, sed eble ankoraŭ ne anoncita sur la batalkampo.

# Malpli oftaj fundamentaj vortoj (Parto 2)

*Francisko Lorrain*

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la dua ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj [ ]. Alta [Z] indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton.

**★ ambos/o**



**1** Fera bloko, sur kiu forĝisto batas metalpecon : *esti inter martelo kaj ~o* [Z] (figurasence, ricevi batojn el du flankoj).
**2** Inkudo [ambosforma meza osteto de la orelo].

**★ amel/o**

**1** Blanka substanco, ekstraktata el semoj (precipe grenoj) aŭ tuberoj (precipe de terpomo), kaj konsistanta el ~o *2* : *terpom~o estas kuirarte uzata*.




**2** Substanco, konsistanta el du aŭ tri polisakaridoj [...], troviĝanta en multaj vegetaĵoj, kie ĝi rolas kiel energirezervo, kaj transformiĝanta en sukeron dum digestado. **~i** (tr) Rigidigi per ~o : *~ita kolumo*.

**★ ardez/o**



**1** Petro fajne kristala, malforte metamorfa, fendiĝanta en platajn tavolojn, uzatajn i.a. for fari tegmentojn. ☞ *skisto*, *filito*.
**2** Tabuleto, pasintece el ardezo, uzata de junaj lernantoj por skribado per kreto aŭ speciala krajono. ☞ [★] *grifelo 2* [ardezkrajono].

Vidu la unuan parton el *La* Riverego 117.



Literature

# La Idoj de la Suno

***Dennis Drown***

## Ĉapitro 4

*La vivo estas sankta, gefiloj*
*Via saĝulo vidas tion*
*Pri la vivo li parolas al vi*

*Aŭskultu do, dum via mateno*
  *Tiam demandu, dum via tagmezo*
    *Kaj dum via vespero*
    *Vi dividu tion, kion vi vidas*
    *Disdonu ĝin*
  *Al tiuj sub la matena Suno*

*Ili aŭskultos vin*
*Ĉar jam vi konas nin*

*- prapatroj de la Taŭakla*

« Kion damne signifas *tuvfa* ? »

Stefano ĵetis severan rigardon al Barbara de trans la matenmanĝa tablo. « Filino mia, ne uzu tian lingvaĵon, kaj tutcerte ne, kiam ĉeestas via frateto ! »

« Blankulon, » diris Roĉjo. « *Tuvfa* signifas blankhaŭtulon. Ili parolas pri ni. »

« Do ŝajnas al mi, ke ili ne tre ŝatas *tuvfa*-ojn. La geknaboj kriaĉas tion al mi. Kaj ne nur unu- aŭ dufoje. Ili komencas krii tiun damnan… pardonu… tiun vorton tuj, kiam ili ekvidas min, kaj ili daŭrigas senĉese, ĝis mi estos for. »

« La vorto ne vere signifas blankhaŭtulon, sed ekstertribanon, » diris Stefano. « Kiam ili krias tion, la infanoj ne intencas insulti vin. Temas nur pri tio, ke por ili vi estas io tute nova. Vi povas eĉ pensi, ke ili bonvenigas vin tiel. »

« Kia bonveno ! Pardonpete, Paĉjo, mi scias, ke tiu ĉi misio gravegas al vi, sed mi ne certas, ĉu mi povos toleri ĉion ĉi. »

Serĉante helpon, Stefano rigardis al sia edzino. Tiu sidis kun malfeliĉa mieno, silente manĝante sian matenmanĝon. Maria preferis diri nenion, ne aldoni al la konversacio.

Maria havis proprajn zorgojn pri iliaj novaj vivoj, kiel misiistoj. Plej grave en ŝia menso, ekde ilia alveno, estis la domo, kiun ili devis nun nomi sia hejmo. Ĝi sufiĉos, ŝi jam decidis. Ili povos loĝi ĉi tie dum du jaroj. Tamen, la eta domo estis tiom proksima al tiu hazarde elpensita limo, al kiu ŝi metis la etiketon « sufiĉa, » ke ĝi minacis frenezigi ŝin pro zorgoj pri ilia propra bonfarto. Nur sufiĉos. Apenaŭ sufiĉos. Ĝi havis du ĉambrojn, eĉ se ili tiom etis, ke la litoj apenaŭ bone sidis en ili. Ĝi havis meblojn, sed ili ŝajnis esti nur ligno kune fiksita per ŝnuro kaj najloj. Maria scivolis, ĉu la tribo konstruis la meblojn nur per si mem, aŭ ĉu Stefano estis helpinta ilin, kiam li iris al la vilaĝo la antaŭan jaron. Ŝi ne pensis, ke la tribo Taŭakla uzas najlojn, sed ŝi timis demandi al sia edzo pri tiuj ĉi detaloj. Ŝi ne certis, ĉu ŝi volas scii.

La domo ne havis kuirejon, nur angulon en la komuna saloneto, kie ŝi povus prepari manĝojn. Ĝi ne havis fornelon, kaj Maria scivolis, kiom longe necesos por kutimiĝi kuiri per la fajrujo ekstere. Intertempe ili havis kelkajn facilajn jam-preparitajn manĝojn, kiuj ankoraŭ postrestis de la vojaĝo, kaj Stefano iam diris, ke familioj en la vilaĝo kuirus por ili laŭnecese. Tiu penso iel maltrankviligis ŝin.

Estos sufiĉe, Maria diris al si mem. Dio helpos nin laŭ niaj bezonoj.

Do, nun ŝia edzo volis, ke ŝi elpensu iujn magiajn, gepatrecajn vortojn, kiuj iel kvietigus ilian filinon, kiuj igus ŝin senti sin hejme en tiu ĉi stranga loko. Maria imagis sin ekstari subite tie ĉe la tablo, rigardante fikse sian edzon, kriante al li unu aŭ du el la pensoj, kiuj estas en ŝia menso ekde la komenco de tiu ĉi vojaĝo : Kion mi diru al Barbara ? Ĉio estas tro fremda ĉi tie por deksesjarulino. Tiu ĉi misio estas via revo, Stefano. Eĉ se ĉio ĉi estas bona por la Taŭakla, ĉu vere ĝi estas bonaĵo por nia familio ? Ni apenaŭ povas komuniki kun tiuj ĉi homoj, kaj jen ni ŝovas niajn infanojn en vivon tute fremdan al ili, mezen de popolo, kiu eble ne povos akcepti ilin. Antaŭe, kiam ni priparolis ĉion ĉi, vi diris, ke tio ĉi estos bonega, neforgesebla sperto por la infanoj. Vi diris, ke tio ĉi estos trezoro, kiun ili havos por la tuta vivo. Tiutempe mi kredis vin. Mi diris al mi mem, ke tia misio povos vere pliriĉigi iliajn vivojn.

Tamen ! Io en mi hezitis. Io en mi kredis, ke niaj infanoj bezonas ne aventurojn, sed stabilecon. Kaj aparte Barbara.

Maria diris nenion el ĉio ĉi. Ŝi pripensis siajn zorgojn silente kaj fermis la okulojn por forpuŝi la malakran doloron, kiun ŝi sentis. Ŝi sidis silente en sia seĝo.

Stefano returniĝis al sia filino. « Barbara, mi scias, ke ĉio ĉi malfacilas. Antaŭ ol ni venis, ni diris, ke eble ne estos tiom facile je la komenco. Ĉu vi memoras ? Sed la vivo ĉi tie ja plifaciliĝos ; vi vidos.

« Vi ekhavos novajn amikinojn, kaj vi vidos, kiom tio helpos vian scipovon de la lingvo. »

Stefano rigardis Roĉjon dum momento kaj tiam ridetis kuraĝige kaj daŭrigis, « Post du semajnoj ni komencos hejmkursojn por vi kaj via frato. Vi povos helpi nin pri la konstruo de la preĝejo, se vi volas. Vi ja trovos novan ritmon por via vivo, vi vidos. Dio sendis nin ĉiujn al tiu ĉi loko por fari Lian laboron. Mi scias, ke ne estas Lia intenco, ke vi estu malgaja. Eble ne ŝajnas tiel nun, sed Li provizas nin per ĉio, kion ni bezonas por feliĉi. Nun estas ni, kiuj devas rekoni Liajn donacojn. Akcepti ilin dankeme kaj uzi ilin por fari Lian laboron estas la ŝlosilo al nia feliĉo. »

Barbara silentis dum momento, dum ŝi rigardis malsupren al sia telero. « Jes, Paĉjo, mi provos, » ŝi murmuris iom rezigne. Sufiĉe malfacilas argumenti kun Paĉjo, ŝi pensis. Tute ne eblas argumenti kun Dio. Kaj kial ĉiam ŝajnas, ke Paĉjo scias kun tuta certeco, kion volas Dio, kion pensas Dio ? Mi neniam scias, kion Li volas. Por mi Dio restas vera mistero !

« Ĉu vi ekskuzos min do ? » Barbara demandis al siaj gepatroj. « Mi pensas, ke eble promeno helpos min kutimiĝi al ĉio ĉi. » Tutcerte helpos, ŝi aldonis al si mem, se mi ne devos aŭskulti pri la bonkora volo de Dio, ke mi feliĉu.

« Jen bona ideo, » diris Maria rapide, antaŭ ol ŝia edzo povis malfermi la buŝon. Ŝi rigardis lin, senvorte dirante, ke prefere ili donu al Barbara la tempon, kiun ŝi bezonas.

Stefano ŝajnis surprizita. Li diris nenion, sed kapjesis, kaj li provis laŭeble montri malgrandan rideton. Pensoj, ke li eble ekperdas la subtenon de sia familio, komencis piki lin. Iel li devis gardi ĉion en ordo.

Barbara sentis iom da senpeziĝo, post kiam ŝi fermis la pordon. Paĉjo kun siaj grandiozaj revoj, ŝi pensis. Kial li ĉiam devas esti tiom intensa ? Ŝi

ekiris al la montetaro, pensante pri la magia lacerto, kiun ŝi vidis hieraŭ.

La pordo remalfermiĝis. Estis Roĉjo. « Ĉu mi povas iri kun vi, Barbara ? Paĉjo diris, ke mi rajtas, se vi konsentas. »

« Eh, nu, bone, ĉi-foje vi povas veni, sed nur ĉi-foje. » Barbara iom miris pro tio, ke fakte komfortigis ŝin la ideo de lia kunesto. Ĉu tiom splenas la vivo, ŝi pensis, ke mi efektive volas la kuneston de la bubeto ?

Ŝi gvidis lin kvazaŭ aŭtomate al la loko, kie ŝi trovis la obaek-arbon. Trankviligis ŝin iomete vidi, ke la geknaboj ne ĉeestas ĉi-foje, ludante ĉe la unua monteto.

Ankaŭ ŝia lacerto estis nevideble for. Ŝi malridetis, kaj ŝi pensis dum momento pri tio, ĉu ŝi diru al Roĉjo pri la magia besto. Ŝi fine decidis ke ne, preferante por la momento gardi la sekreton por si mem.

Anstataŭe ŝi decidis montri al li la mortan kampon kun la strangaj konusoj. La Taŭakla knabo, kiun ŝi ekkonis, tuj venis al ŝia menso. Do *tuvfa*, ŝi diris al si, rememorante la katastrofon de hieraŭ, signifas nur ekstertribanon. Almenaŭ tiu ĉi knabo, Ĝarelo, ne kriaĉis la vorton al mi senĉese. Malfacilas al mi kredi, ke aĉa ĉantado tia povus esti bonvena saluto.

Ŝi scivolis, ĉu hodiaŭ li estus en la kampo denove. Verŝajne jes, ŝi pensis, kun sia duonnuda korpo. Necesos tempo, por ke mi kutimiĝu al tio. Ŝi rigardis Roĉjo-n, kaj li rigardis ŝin reciproke. Li ridetis timeme. Kompatinda bubo, ŝi pensis. Li ŝajnas tute kontenta nur pro tio, ke mi permesas, ke li kunestu kun mi. Li tre amas min malgraŭ la malamo, kiun mi evidente ĉiam montras al li. Nun ŝajnas, ke li estas la ununura afero, kio ne tute fremdas al mi.

« Venu, Roĉjo. Ĉu vi volas vidi ion interesan ? »

Roĉjo babilis kontente, dum ili desupris al la kampo. Tre plaĉis al li tiuj maloftaj okazoj, kiam lia fratino emis pasigi tempon kun li. Kiam li ekvidis la konusojn, tamen, li haltis momente. Tiam li fulmkuris al la plej proksima. Barbara plirapidigis sian promenon por reatingi lin.

« Kio ĝi estas ? » li demandis al ŝi mire, kiam ŝi fine alvenis al la konuso. Lia voĉo plenis je miro.

« Ili kultivas tiun ĉi planton kaj poste faras tiujn ĉi konusojn. Estis knabo ĉi tie hieraŭ, kiu klarigis al mi pri la tuta procedo. La ununura problemo estas, ke mi komprenis eĉ ne vorton de tio, kion li diris al mi. »

« Kiu planto ĝi estas ? Estas maizo, ĉu ne ? »

« Mi ne scias, Roĉjo. Li diris al mi la nomon, sed ĝi estis la taŭakla nomo kompreneble. *Ma…mak*…io. Mi ne memoras la vorton, kiun li uzis. »

« *Makoĉe*, » diris Roĉjo. « Do ĝi ja estas maizo. »

Barbara rigardis sian fraton mire. Kiel li scias tion ? Ĉu li efektive atentis dum tiuj preparaj lecionoj, kiujn donis al ni Paĉjo, antaŭ ol ni alvenis ?

Ŝi prenis unu el la folioj de la konuso, ĉifetis ĝin en sia mano. Tiam ŝi levis ĝin al sia nazo kaj flaris ĝin. « Roĉjo, hieraŭ, kiam mi flaris tiujn ĉi foliojn, la aromo ekvekis ion en mia memoro. Sed mi ne scias kion. Mi estas flarinta tiun ĉi odoron iam antaŭe. Mi ne pensas, ke estis maizfolioj. Mi ne kredas, ke iam ajn mi flaris maizfoliojn. »

Roĉjo prenis la sekan folion de sia fratino kaj ekflaris ĝin. Venis al lia vizaĝo kurioza mieno. « Jes, jes, » li murmuris. Tiam li enŝovis sian nazon laŭeble profunde en la sekan maizkonuson. Li snufis la aromon de la folioj dum kelkaj sekundoj. Tiam, subite li eltiris sian kapon kaj rigardis triumfe al Barbara.

« Avinjo ! » li kriis kaj ridetis feliĉe. « Avinjo Whitley. »

« Kio ? Avinjo Whitley ne odoris kiel tiuj maizfolioj, stultulo. Pri kio vi parolas ? »

Roĉjo daŭre ridetis, ne atentante la insulton. « Barbara, antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni foje iris al la etbieno de niaj geavoj, ili kultivis arakidojn. Ĉu vi rememoras ? Foje dum la vespero ni sidis ĉetable kun Avinjo kaj elguŝigis arakidojn. »

Barbara prenis alian folion kaj flaris ĝin. « La interno de la arakidguŝoj odoris tiel ĉi, ĉu ne ? Jes, ja ! Mi neniam pensus pri tio. » Ŝi ridetis al li. « Sed vi rememoras nur pro tio, ke vi ĉiam emis meti la malplenajn guŝojn sur vian nazon. Kaj kiam Patro vidis vin, li ordonis al vi seriozi. » Ŝi provis imiti severan voĉon de sia patro kaj mok-riproĉe diris al li, « Ne ludu kun nutraĵo ! »

« Se mi bone rememoras, » li ridis, « ankaŭ vi havis arakidan guŝon sur la nazo unu-du-foje. »

« Eble, sed Paĉjo neniam vidis min. » Ŝi eksplodis pro rido.

Memoro pri tiuj malseriozaj momentoj kaj la fortega rido mem de Barbara kaptis Roĉjon. Li ellasis ridegon kaj falis sur la teron, ridante plu. Lia korpo frapis la teron—pum, kaj Barbara ekzorgis, ke eble li vundis sin. Ŝi volis demandi al li, ĉu li bone statas, sed ŝi povis apenaŭ eligi la vortojn. Ŝi ne povis ĉesi ridi sufiĉe por paroli.

Ankaŭ Roĉjo malkapablis responde diri, ke ĉio bonas, tiom li estis ridanta. Tiel ili daŭrigis dum kelkaj minutoj. Jam preskaŭ forgesinte la etbienon de la geavoj, ili ridis nur pri sia propra malseriozeco kaj pri tio, ke ili tute ne povas ĉesi.

Barbara ne povis rememori la lastan fojon, kiam ŝi ridis tiel kun sia frateto. Eble estis antaŭ pluraj jaroj ĉe la etbieno, elguŝante arakidojn kun Avinjo Whitley. Tiu ĉi certe estis la unua fojo, je kiu ŝi ridis, ekde kiam ili forveturis de sia hejmo. Ŝi sentis sin bone pro la rido, senpeza.

« Kial ni ĉesis iri al la etbieno, Barbara ? » Roĉjo demandis. Estis nun iomete da malfeliĉo en lia voĉo. « Ni iris preskaŭ ĉiun jaron, kaj tiam subite, ne plu. Ĉu vi scias, kio okazis ? »

« Mi ne certas, Roĉjo. Mi pensas, ke temis pri io inter Paĉjo kaj Avo Whitley. Post tiu lasta fojo ili malofte parolis unu al la alia. »

« Barbara ! » Voĉo alvokis de la alia flanko de la maizkampo.

Barbara rigidiĝis. Do li ja estas ĉi tie denove, ŝi pensis. Ŝi ne certis, ĉu ŝi taksas tion bona novaĵo. Ŝi sentis, kvazaŭ io en ŝi subite ekkrias, ke ŝi forestu tuj, ke ŝi kuregu tiom rapide, kiom eblas, sed samtempe ŝi tre volis resti. Ŝi volis vidi lin denove.

« Ŝajnas, ke iu konas vin, » diris Roĉjo. Li rigardis Ĝarelon, dum tiu alproksimiĝis. Plaĉis al li la longaj haroj de la pli aĝa knabo. Neniam lia patrino permesus al li, ke li havu tiom longan hararon. Eble ne gravis, li pensis, ĉar miaj haroj estas tro buklaj, kaj ili blondas. Roĉjo rigardis, kiel brilas la nigraj haroj en la sunlumo, kaj kiel iliaj ekstremaĵoj svingiĝas kaj ludetas sur liaj nudaj ŝultroj, dum li piediras al ili. Tiuj ŝultroj, vere la tuta korpo, tre impresis lin. Tiom muskola li estas, pensis Roĉjo, sendube pro laboro en tiuj ĉi maizkampoj. Li pensis pri sia propra korpo. Magrega ! Ke ĝi aspektu pli kiel la lia, li revetis. Rigardu la brunan haŭton…

« Barbara ! » diris Ĝarelo, kiam li atingis ilin. « *Tanala maa*. »

« *Tanala ma*, » Barbara respondis kaj levis siajn manplatojn salute. Ŝi provis rideti, sed ŝi sentis sin stulta. Jen, ŝi pensis. Jen ĉio por nia konversacio hodiaŭ. Eble li daŭrigos pri la maizo, kaj denove mi povos stari ĉi tie, rigardante lin kiel stultulino, komprenante nenion. Jes, lia voĉo belsonas, sed ŝajnas al mi idiote, ke ni parolu unu kun la alia, kaj nek unu nek la alia komprenas ion ajn. Ĉu mi diru al li pri mia hejmo ? Pri miaj amikinoj tie ? Li komprenos nenion, sed almenaŭ mi parolus ĉi-foje. Tio pli bonos ol nur rigardi unu la alian

senvorte, ĉu ne ? Jes, ja, la stultulo kaj la idiotino ! Rigardu nin ! Pli bonus, se hodiaŭ li ne estus en la kampo. Estus pli bone, se mi ne estus reveninta. Kaj ĉefe kaj cetere, kial damne tiu ĉi knabo neniam surmetas ĉemizon !?!

« *Tanala maa. Ko Roĉjo mido jada. Ko babeĝo Barbara'o mido kena.* » La vortoj de ŝia frateto tiris Barbaran el ŝia frustro. Ŝi gapis al li. Estis por ŝi, kvazaŭ ia indiĝena spirito ekposedis lin. Ŝi ne povis aŭdi akĉenton. Eĉ patro parolas kun akĉento, ŝi pensis, sed ĝuste nun Roĉjo sonis ĝuste samkiel ili.

Ĝarelo diris ion al li. Denove ŝi ne komprenis eĉ unu vorton, kaj ŝajnis, ke nun li estas parolanta pli rapide ol antaŭe. Evidentis tamen, ke Roĉjo komprenis, ĉar li diris ion responde al Ĝarelo, kaj la du knaboj interparolis dum minuto, dum Barbara nur staris tie silente, rigardante ilin mire.

« Roĉjo, vi vere komprenas lin, ĉu ? »

« Eh ? Nu, jes, se li ne parolas tro rapide. »

« Tro rapide ? Li babilas kun vi paf-rapidege ! Kiel vi faras tion ? Kiel vi povas paroli kun li ? »

« Barbara, Patro donis al ni klasojn pri la taŭakla lingvo. Mi atentis, kredu aŭ ne. Tio estis interesa por mi. Ankaŭe, dum la lastaj tagoj, mi pasigis multe da tempo kun kelkaj virinoj en la vilaĝo. Mi pensas, ke ili pli-malpli adoptis min. Ili nomas min *tepoga na*, blanka gemeto. »

« Sed vi ne havas akĉenton ! Vi ŝajne parolas la lingvon pli bone ol Patro. » Ŝi ekridis tiam, pensante pri tio, kion li ĵus diris. « Gemeto, ĉu ? Mi pensas, ke mi elektus alian nomon por vi. »

Ĝarelo regardis ŝin dum momento. Tiam li diris ion al Roĉjo.

« Li volas scii, kial vi ridas. Cetere, mi ja havas akĉenton, kvankam mi provas laŭeble perdi ĝin. La virinoj ofte ridas pri ĝi. 'Plaĉete.' Ili diras, ke mi parolas plaĉete. » Roĉjo malridetis.

« Li volas scii, pri kio mi ridas ? » demandis Barbara, revenante al la temo de Ĝarelo. « Diru al li, ke mia propra frateto ekestas Taŭaklano. » Ŝi ridetis al Ĝarelo.

Kiam Roĉjo tradukis ŝiajn vortojn tamen, Ĝarelo konfuziĝis. La vortoj de lia patro reeĥis en lia menso. Ili volas, ke ni forgesu, ke ni estas Taŭaklaj. Li grimacis. Dum sekundo li pensis, ke ĉi tio povus esti ia ruzo. Li dubis tion tamen. Lia koro diris al li, ke ĉi tiu knabino ne estas trompemulo. Eĉ se ŝi ne estas filino de dio, li diris al si, ŝi estas bona homo. Ŝi ja estas mistera tamen, ankaŭ la eta knabo.

« Kial ŝi dirus, ke vi ekestas Taŭakla ? » li demandis al Roĉjo. « Tio ne eblus, ĉu ? »

« Ŝi diris tion nur pro tio, ke mi scipovas vian lingvon. »

« Sed scipovi ies lingvon ne signifas esti ano de ties popolo. » Ĝarelo parolis serioze. « Oni devus naskiĝi kiel parto de tiu popolo. »

« Kompreneble. Ŝi estis nur ŝercanta. » Roĉjo rigardis al sia fratino. Liaj okuloj petis ŝian helpon, sed ŝi ne komprenis iliajn vortojn.

« Ĉu tiuj ĉi homoj ne komprenas simplan ŝercon ? » ŝi demandis, post kiam Roĉjo klarigis al ŝi pri tio, kio estas okazanta. « Eble ni parolu pri io alia. Demandu al li pri la maizo. »

Pri maizo Ĝarelo sciis multe. Li permane indikis la mortan kampon, kaj diris, ke post monato la tribo ekpreparos la sterkon por nova estonta rikolto. Tiam, post alia monato, viroj plantos la semojn kune kun la sterko. Post du semajnoj ekaperos la ĝermantaj maizidoj.

Ĝarelo parolis malrapide kaj paŭzis ofte, por doni al Roĉjo la okazon traduki por sia fratino. Iom malfacilis por la knabeto tamen, ĉar estis pluraj vortoj, kiel la taŭakla vorto por sterko, kiujn li ne komprenis. Foje li petis klarigon de Ĝarelo, sed li timemis tro ofte fari tion. Ĉiuj ekscitiĝis kaj laŭdis lin pro lia rapidega lernado de la lingvo. Li ne volis esti ĉiam demandanta, « Kio ? Kio ? Kion signifas tio ? »

Ĝarelo daŭrigis, dirante, ke la radikoj de la novaj maizplantoj tiam kreskos dum tri semajnoj, antaŭ ol komenciĝos la pluva sezono, kiu daŭras dum pli -malpli tri monatoj. « Ĉiam, kiam pluvas, » li diris, « ni havos kvar virojn en ĉi tiu kampo por direkti la akvon, kaj du pliajn virojn en la malpli granda kampo, kie ni kreskigas la ruĝan maizon. Post la unua monato de pluvo, virinoj kaj geknaboj plantos fazeolojn inter la maizplantoj. »

Ĉio ĉi estis iom pli ol tio, kion atendis Barbara. Almenaŭ ĉi-foje mi havas tradukiston, ŝi pensis. Nu, tradukisteton. Ial Ĝarelo tre ekscitiĝas pri maizo. Mi sentas min, kvazaŭ mi devus starigi iujn demandojn, sed mi ne scias, kion demandi. Estas bizare, ke ĉiam parolas nur li. Sed kion mi diru ? Maizo, por mi, venas el superbazaro. Ĉu mi nur lasu lin daŭrigi ? Ŝajnas, ke li sufiĉe kontentas prelegi pri dezerta maizkultivado. Strangas tamen, ĉu ne ? Ŝajnas, ke ĉio strangas, koncerne tiun ĉi knabon, koncerne la tutan lokon fakte.

Post kiam Roĉjo finis sian tradukon, Ĝarelo klarigis pri tio, ke la tribo gvatas la kampojn tage kaj nokte dum la pluva sezono. « Dum la tago, » li diris, « pli

aĝaj knaboj gardas la plantojn kontraŭ birdoj, bestoj kaj insektoj. En la nokto tamen, estas viro, kiu devas gardi la kampon. Li havas fajron por timigi bestojn. Insektoj estas problemo nur dum la unuaj kaj lastaj semajnoj de pluvo. Kun la unuaj pluvoj venas la muŝetoj, kaj dum la lastaj venas akridoj. La ruĝaj kaj nigraj akridoj tre bongustas. Sed la flavaj akridoj bongustas, nur kiam ili ankoraŭ malgrandas. »

« Ho, Dio, vi manĝas akridojn ? » Barbara kridemandis. Hororo kovris ŝian vizaĝon. « Ĉu vere vi manĝas insektojn ? » Roĉjo tradukis la demandon.

« Ni ne manĝas la grandajn, flavajn akridojn, » li klarigis. « Ni povas nur mortigi ilin perfingre. » Klak ! Li mortigis imagitan akridon por montri al ŝi.

Barbara eksentis sin naŭzita. Tremeto suprenkuris ŝian spinon, dum ŝi imagis teleron plenan je insektoj. Ho, Dio, aĉe ! ŝi diris al si mem. Tiam ŝi rigardis Ĝarelon, kaj denove li aspektis konfuzita. Ŝi decidis, ke prefere ŝi kaŝu siajn sentojn pri tiu ĉi temo, se eblus, kaj ŝi ridetis al li denove.

Sekvis mallonga silento. Tiam Ĝarelo reprenis la konversacion. « Kio estas via baznutraĵo ? » Voĉo en li flustris, ke ŝi respondos, « argilo. » Li malatentis la voĉon.

« Kia stranga demando ! Kion li volas diri ? » Barbara demandis al si, ĉu konversacioj kun tiu ĉi knabo ĉiam gvidos ilin al io strangega. Ŝi frustriĝis. « Ni ne havas baznutraĵon, ĉu ? » ŝi demandis al Roĉjo. « Ĉiuokaze, kiel vi jam komprenas nekutiman koncepton, kiel baznutraĵon, en ilia lingvo ? »

« Barbara, ĉi tie la homoj ĉiam manĝas maizon de unu formo aŭ alia. Paĉjo parolis al ni pri tio. Maizon. Ĉiam maizon. Ĝi estas parto de ĉiu manĝo, ĉiutage. Li volas scii, kiun nutraĵon ni havas kun ĉiu manĝo. »

« Sed ni ne havas nutraĵon tian ! Ni ne havas baznutraĵon. Ni manĝas diversajn aĵojn, kaj ne estas io, kio ĉiam estas surtable. Eble pano pleje proksimiĝas, sed eĉ tion ni ne ĉiam manĝas kun ĉiu manĝo. Diru al li tion : ni ne havas baznutraĵon, sed se ni havus ion tian, estus pano. »

« Do, ĉu vi manĝos la akridojn, Barbara ? » Roĉjo demandis al ŝi kun petolema rideto.

« Kompreneble ne ! Ĉiuokaze, ne postrestos sufiĉe por mi, ĉar vi certe finmanĝos ilin ĉiujn, » ŝi ŝercis.

« Euh ! Mi ne scias pri tio. »

« Devos esti Paĉjo, do ! Paĉjo povas manĝi ilin. Li volas sian grandiozan sperton en fremdejo. Jen ĝi : akridoj. Diru al Ĝarelo, ke nia patro volos provi la akridojn. »

« Eble niaj patroj manĝu ilin kune, » respondis Ĝarelo.

Roĉjo ridetis. « Ĉu, kaj kial ? »

Ĝarelo ekhavis seriozan mienon. « Estus bone, se mia patro ekkonus vin, mi pensas. » Tiam li paŭzis, sciante, ke la cetero estus malĝentila. Tamen, io en li estis flustranta, ke li daŭrigu. « Mi ne volas esti malrespektema al vi, » li diris heziteme. « Mi tre ekscitiĝas pri tio, ke vi venis tien ĉi por vivi inter ni. Estas nur, ke mia patro maltrankvilas pro tio, ke vi alportas ŝanĝojn al nia vilaĝo. Lin treege zorgigas ŝanĝoj.

« Mi esperas, ke vi pardonos, ke mi diris tion. Mi tre kontentas, ke vi estas tie ĉi, kaj mi volas, ke vi sentu vin bonvenaj. Al mi vi ŝajnas bonaj homoj, kaj mi pensas, ke mia patro opinius same, se li nur ekkonus vin. Nu, mi ankoraŭ ne konas vian patron, sed mi supozas, ke ankaŭ li estas bona homo. Ĉu mi pravas ? »

Tradukinte la demandon de Ĝarelo, Roĉjo ridetis. Li sentis sin ludema kaj ekscitita, kaj al li tute ne gravis la mornaj opinioj pri patroj. Sed li ja volis scii, kiel lia fratino respondos al demando tia pri ilia patro.

Barbara rigardis kompreneme al Ĝarelo. Ŝi pensis dum momento pri sia respondo. « Nu, mi devas diri, ke li ja *estas* bona viro, » ŝi diris, « sed tre ofte ni ne plene akordiĝas, pri pluraj aferoj. »

« Ŝajnas iom kiel mi kaj mia patro. » Ĝarelo ridetis al ŝi.

Roĉjo tradukis liajn vortojn, sed iel Barbara jam sciis tion, kion li estis dironta. Ŝi rigardis en liajn okulojn. « *Mido ah baaba maa*, » ŝi ripetis liajn vortojn en lia lingvo. « Mi kaj mia patro. » Dum momento Barbara forgesis pri akridoj, pri maizo, pri ĉiu fremdaĵo, kiu estis mordetanta en ŝian fragilan trankvilon. Ĝuste nun en la malhelbrunaj okuloj de Ĝarelo, ŝi ne plu vidis fremdan Taŭaklan tribanon. Ŝi vidis knabon de sia aĝo, kiu eble havas problemojn kun sia patro, ne tiom malsimilajn al la ŝiaj. Ŝi sentis subitan varmon en sia koro. Ŝi provis rigardi pli profunden en lin, kvazaŭ ŝi povus vere koni la knabon, se nur ŝi povus vidi sufiĉe profunden en liajn okulojn. Tiam malrapide endrivis en ŝian kapon la penso, ke ŝi

estas nun tenata, kaptita en tiuj okuloj. Ŝi ne povis forturni sian rigardon. Ŝi ne volis.

Ankaŭ Ĝarelo estis kaptita. La safiraj okuloj de Barbara fiksis lin. Eble ŝi ja estas filino de dio, li pensis. Eble la *tuvfaa* diino de beleco naskis ŝin. Li ne konis la morojn de ŝia popolo, sed Ĝarelo sentis fortegan deziron doni al ŝi sian unuan kison. Li prenis ŝiajn manojn, kaj, sen rigardi al sia eta tradukisto, li komencis priskribi por ŝi la Taŭaklan riton de unua kiso.

« Antaŭlonge en la tempo de niaj prapatroj, vivis virino. Vi devas kompreni : treege maloftas, ke iu povas paroli kun gedioj. Normale nur saĝulo povas fari tion, sed tiu ĉi virino estis speciala. Ŝi naskiĝis dum la rito de la Plena Luno. La unua afero, kiun ŝi vidis en sia vivo, estis la Panja Luno. Pro tio, la saĝulo nomis ŝin Kojkiĝa, kio signifas lunlumon. Ekde la infanaĝo evidentis al la tribo, ke ŝi posedas sanktan ligon al la gedioj. Ni havas plurajn rakontojn pri Kojkiĝa. Unu el ili okazis, kiam ŝi estis junulino, proksimume samaĝa kiel vi kaj mi. Knabo enamiĝis al ŝi, kaj iun tagon li volis kisi ŝin.

« Estis la unua fojo en ŝia vivo, kiam iu volis kisi ŝin, krom la familiaj kisoj de gepatroj kaj geonkloj. Ĉi tiu knabo volis la specon de kiso, kiu invitas amon inter du personoj. Kojkiĝa ne diris al li jes. Nek ŝi diris ne. Ŝi surgenuiĝis sur la Teron tie antaŭ li, kaj ŝi eksonĝis.

« Vidu, plej ofte tiuj, kiuj povas paroli kun la gedioj, parolas al ili en sonĝo. La gedioj ŝatas sonĝojn. Kiam la menso ne estas tiom ligata al la vivo en la Veka Mondo, al prizorgo de maizo, al serĉado de akvo, al preparado de manĝoj, tiam ekzistas la ebleco rigardi trans ĉi tiun mondon al alia mondo, kiu kuŝas pretere. Tial la gedioj kutime preferas veni por paroli kun homo, dum tiu sonĝas. Ili prenas la personon al tiu kaŝita mondo. Sed ekzistas personoj, kiuj kapablas sonĝi en vekiteco, kaj kelkaj homoj, tre malmultaj, povas regi sin sufiĉe por iri al la Nevidebla Mondo, kiam ajn ili deziras.

« La Nevidebla Mondo estas la mondo de la gedioj. Tie vivas niaj prapatroj. La Taŭakla estas parto de tiu mondo. Ni vivas en ĝi, samkiel ni vivas en la Vekita Mondo, aŭ la Mondo de Formo, kiel nomus ĝin saĝulo. Sed estas malfacile por ni senti la Nevideblan Mondon, krom en niaj sonĝoj. Tial, tiuj, kiuj kapablas sonĝi en vekiteco estas specialaj, kaj nur kelkaj, kiuj povas plene enpaŝi en siajn sonĝojn, povas promeni, kvazaŭ vekitaj, en la Nevidebla Mondo. Kojkiĝa estis unu el ili.

« Kojkiĝa ne komprenis kisojn. Ŝi ne komprenis, kial homo havas deziron kisi alian homon. Kio

estas tiom speciala pri lipoj ? Ŝi volis scii. Kial oni ne kunigas orelojn aŭ piedfingrojn anstataŭe ? Pri manoj ŝi komprenis. Homoj volas kunigi manojn kaj tuŝi unu la alian pere de manoj, ĉar homoj bezonas tuŝon. Per tuŝo, pli ol per vortoj, ni komunikas nian amon, amikecon, feliĉon, nian bonecon. Manoj estas la centro de homa tuŝo. Lipoj, tamen, estas por paroli. Buŝoj estas por manĝi. Kial homoj esprimas volupton pere de lipoj ? Kial ili esprimas amon tiel ? Tion ŝi vere volis kompreni. Ŝi eksonĝis do.

« Plejofte, se la gedioj volas paroli kun iu, ili mem venas al tiu homo en lia sonĝo. Kojkiĝa ne volis atendi, ke diino venu al ŝi. Ŝi sciis pri vojo al la Nevidebla Mondo, kaj tien ŝi iris por serĉi Uŝon.

« Uŝ, kiel eble vi jam scias, estas la diino de Amo. Kojkiĝa sciis, ke la homoj uzas kisojn ankaŭ por familieco, amikeco kaj seksumado. »

Barbara suprenlevis la brovon, kiam Roĉjo tradukis tiun ĉi lastan parton. Ĝarelo menciis sekson tiom nature. Estis neniu nervoza rido, neniu petola rideto. Ŝajnis, kvazaŭ li parolas pri seksumado tiel, kiel pri ajna normala konversacia temo por junulo ; tiom normala, kiom la parto pri familio kaj amikoj, tiom, kiom liaj prelegoj pri maizo.

Ĝarelo vidis la surprizon de Barbara, sed apenaŭ estis hezita paŭzo, dum li daŭrigis sian rakonton. « Sed al Kojkiĝa amaj kisoj ŝajnis la plej noblaj. Ŝi pensis pri tio, ke familianoj ja amas sin. Ankaŭ amikoj. Plue, amoro oftege estas maniero, per kiu oni montras sian amon al alia. Do amo estis la klavo. Tial kun Uŝ ŝi devis paroli, al Uŝ demandi pri la kialo de kiso.

« Mi ne scias, kiel estas kun viaj gedioj, » diris Ĝarelo, « sed laŭ la sperto de mia popolo, la gedioj malemas doni simplajn, rektajn respondojn al la demandoj de homoj. Kaj el ĉiuj niaj gedioj, la diino de Amo estas la plej mistera. Ŝiaj deziroj tro ofte estas la plej malklaraj, kaj malfacilas sekvi ŝian volon. Ne plaĉas al ŝi paroli per vortoj, kaj nur unu vorton ŝi diris al Kojkiĝa : ‘Kisu !’ Uŝ kraĉis la vorton al ŝi, kaj tiu vorto frapis Kojkiĝan rekte en ŝian vizaĝon tiom forte, ke ŝi falis el sia sonĝo sur la Teron.

« La knabo, kiu estis petinta kison, surgenuiĝis ĉe ŝian flankon por helpi ŝin restariĝi. Ŝi forte prenis lin kaj kisis lin ĝuste sur la lipoj, kaj per tiu unua kiso ŝi tuj komprenis, kial homoj kunigas lipojn. Ŝi havis la respondon al sia demando. Ŝi komprenis tiam. Ŝi ne povis vortigi tiun komprenon, sed ŝi sciis, ke ĉiam ĝi estos parto de ŝi. »

Ĝarelo prenis la manojn de Barara en la siajn. Li riverence klinetis sian kapon. « Barbara, mi ankoraŭ ne komprenas, kial homoj kunigas lipojn. Se vi konsentos, mi volus dividi unuan kison kun vi, por ke ankaŭ mi eksciu, samkiel Kojkiĝa. »

Por Roĉjo traduki la rakonton de Ĝarelo estis malfacile. Plurajn vortojn li ne konis, kaj li lacis post tiom da laboro.

Sed Barbara komprenis. Foje, kiam ŝia frato stumblis, dum li angligis la rakonton, ŝi enmetis taŭgan vorton. Ŝi pensis pri Uŝ kaj premetis la manojn de Ĝarelo. Ŝi rigardis en liajn okulojn. Iu deziro flamis en ili. Samkiel Kojkiĝa, li deziris scii. Per kiso ŝia li volis lerni.

Malrapide Ĝarelo kliniĝis al ŝi kaj tuŝis ŝiajn lipojn per la siaj.

Barbara tremetis. Unufoje antaŭe knabo kisis ŝin, sed ne per tiom da ceremonio. Ŝi sentis sin, kvazaŭ ŝi ne povus moviĝi. Ŝi scivolis, ĉu la diino Uŝ rigardas nin ?

Ĝarelo kisis ŝin mallonge, sed tenere. Tiam, li premetis ŝiajn manojn kaj rigardis en ŝiajn okulojn. Li ridetis timeme al ŝi.

La kiso mem estis simpla kaj senartifika, sed Uŝ dirus, ke senartifikeco ne haltas ekbruladon de pasio, kiam pasio vekiĝas. Barbara povis vidi la deziron en la okuloj de Ĝarelo. Ĝi estis flamo, kaj ĝi flagris, kiam li ridetis al ŝi. La flamo kaptis ŝin. Ŝi ne povis ĉesi rigardi ĝin. Ĝi tenis ŝin fikse, dum ĝi brulis, hejtante lian korpon, nutrante sin per la emocioj, kiujn li sentis. Ekbrilis sovaĝa flagrego momente, dum li enspiris. Tiam ĝi brulis pli konstante. Ĝi estis dolĉa flamo, sed kruda. Ĉu tio ĉi estas la flamo de Uŝ ? Barbara demandis al si. Ĉu mi estas kaptita ĝuste ĉi tie en la flamo de la pagana diino de amo ? Ĉu tiu ĉi knabo amas min ?

Ĝarelo ne rakontis tion, kaj Barbara ne pensis pri ĝi, sed foje, kiam Uŝ kreas flamon en homo, ŝi lumigas reciprokan flamon en alia persono. Ŝi ne sciis, ke ankaŭ Ĝarelo estis kaptita per flamo en ŝiaj propraj okuloj. Ŝi sentis ĝian brulon tamen, sen vere kompreni tion, kion ĝi signifas. Ŝi etendis siajn manojn, kroĉis la ŝultrojn de Ĝarelo, kaj kisis lin. Ŝi kisis lin forte.

Senartifikeco rigardis pasion fikse, dum Roĉjo rigardis la kison. Li sciis, kion li vidas, sed komence li ne certis, kion pensi pri ĝi. Tiam li suspiris kaj pensis, almenaŭ mi povas preni paŭzon el mia traduka laboro.

Neniam li estis vidinta sian fratinon agi tiel ĉi. Ŝi menciis unufoje, ke Danielo estis kisinta ŝin dum ŝia bonvojaĝa festo. Ĝuste nun tamen, ŝajnas,

kvazaŭ ŝi atakus tiun ĉi novan knabon. Roĉjo imagis momente, ke demono subite prenis lian fratinon, kaj nun ekregas ŝian animon. Li scivolis, ĉu iun tagon li volus kisi knabinon, samkiel Ĝarelo nun kisas lian fratinon. Ĝarelo ŝajne ĝuas la atakon. Roĉjo rigardis liajn lipojn, dum ili karesis tiujn de Barbara. Li enanhelis subite. Li fermis siajn okulojn.

Kiam li remalfermis ilin, Roĉjo vidis la langon de sia fratino gliti en la buŝon de Ĝarelo. Ho, Dio mia ! Barbara ! Kion vi faras al li ? Roĉjo pensadis pri tio, kiom ŝajne ĉio ĉi plaĉas al Ĝarelo. Li rigardis la fermitajn okulojn de Ĝarelo, la strangan mienon sur ties vizaĝo, kiu esprimis specon de plezuro, kiun la pli juna knabo ne konos ankoraŭ dum iom da tempo.

Mi povas vidi, kial ŝi ŝatas lin, Roĉjo diris al si. Eble estus bonaĵo, se li foje venus al la domo por viziti ŝin. Tiel certe estus pli interese, kaj cetere, eble nun ŝi ne estos ĉiam tiom malagrabla.

« Ne rigardu min tiel, bubaĉeto ! » Barbara kriis al li, ekkonstatante, ke ŝia frato estas senhonte rigardanta ilin fikse, kaj ke li vidas ŝin perdi sian sinregon entute.

« Kial ne ? Sen mi, vi eĉ ne povus paroli kun li. Vi eĉ ne scius, ke li volas kisi vin. Pripensu tion, Barbara. Sen mi, vi ne havus vian novan koramikon. »

« Li ne estas mia koramiko, » ŝi vipe respondis al li. Tiam ŝi ridetis. « Vere, mi ne vere certas, kio li estas nun. »

« Li estas via koramiko, sendube. Mi vidis la kison, Barbara. Aŭ ĉu vi nomiĝas Kojkiĝa ? »

« Nu, Kojkiĝa devus esti li. Vi scias, ke mi jam antaŭe kisis knabon. Sed eble prefere, ni ne diru tion al li. »

Ŝi rerigardis al Ĝarelo, kies okuloj neniam forlasis ŝin. Tiuj malhelaj okuloj, ŝi pensis, tiom profundaj. Estas, kvazaŭ mi povus vidi lian animon. Ŝi ja povis vidi flamon en ili, la flamon de Uŝ. Kiu estas tiu ĉi knabo ?

« Bone, Roĉjo, » ŝi diris, ankoraŭ rigardante en la okulojn de Ĝarelo, « vi nun estas mia nova instruisto de la taŭakla lingvo. Kion vi pensas pri tio ? Sekvont-foje, kiam mi vidos lin, mi volas diri ion al li. Eble estos nur io eta, sed mi povos diri ĝin, sen la helpo de iu ajn. Diru tion al li. »

Ĝarelo ridetis al ŝi. « Jam sorĉas min la sono de via voĉo, » li diris. « Kio okazos, kiam mi povos kompreni viajn vortojn ? Ĉiu-okaze, mi antaŭĝojos tiun momenton. »

Barbara rigardis sian frateton. Kompatinduleto, ŝi pensis. Evidentas, ke li lacas. Ni reiru hejmen. Malplaĉus al Paĉjo, cetere, se ni estus for la tutan tagon. Mi povos revidi tiun ĉi misteran kaj mirinde belan knabon iom poste. Jes, laŭeble baldaŭ.

Jen la kialoj, kiujn Barbara donis al si mem por reiri hejmen, sed verdire ŝi forte sentis, ke ŝi bezonas iom da tempo sola. Ŝi ŝategis la senton esti perdita en la okuloj de Ĝarelo, sed ŝi sentis ankaŭ, ke ŝi bezonas momenton por pensi kaj rekapti sian spiron. Ŝi sentis sin konfuzita. Ŝi ne konis tiun ĉi lokon. Ĝi estis fremda al ŝi, kaj stranga. Iel, tamen, tiu ĉi knabo nun malsamis. Ŝi sciis preskaŭ nenion pri li, sed ŝi sentis, ke estas io en li, kion ŝi povas rekoni. Ŝi ne povis nomi ĝin aŭ priskribi ĝin per vortoj, sed ŝi sciis, ke ĝi estas tie. Ŝi sciis, ke Ĝarelo iel estas oazo en tiu ĉi fora dezerto.

En ŝian koron enverŝiĝis tondre riverego da emocioj, kaj la demando reeĥis en ŝia menso : kiu estas tiu ĉi knabo ? Ĉio ĉi estis tro por ŝi, kaj ŝi timis, ke ŝi subite ekploros. Ŝi ne volis plori antaŭ li.

Ŝi prenis liajn manojn, adiaŭis lin taŭaklalingve, « *Saon keĉel gao*, » kaj donis al li kison sur la vango.

Barbara povis vidi en la okuloj de Ĝarelo, ke li ne volas, ke ŝi iru, sed ŝi sciis, ke ŝi devas. Ju pli longe ŝi restis, des pli forte plenigis ŝin la frenezaj emocioj, ĝis ili minacis eksplodi el ŝi. Ŝi jam sentis, ke ŝi apenaŭ povas spiri. Ŝi ne volis forkuri, kiel je la lasta fojo. Ĉi-foje ŝi volis adiaŭi lin, kiel farus normala homo.

« Roĉjo, venu. Ĉu vi pretas ? »

Ŝi mansvingis al Ĝarelo, turniĝis kaj ekiris hejmen.

Dum ŝi foriris, ŝi aŭskultis Roĉjon, dum li rapide ĝisis Ĝarelon. Ŝi ne komprenis tion, kion diris la du knaboj ĝis la fina adiaŭo : « *Saon keĉel gao.* » Ŝi ĵaluzis. Tiom multe ŝi volis diri al Ĝarelo. Dum momento ŝi pensis pri tio, esprimi al li ĉion, kion ŝi sentas ĝuste nun. Ŝi volis rakonti pri tio, kiel la loko ege fremdas. Ŝi volis diri al li pri la kiso, kaj pri tio, ke, malgraŭ iliaj malsimilaĵoj, estas io en li, kion ŝi ja komprenas, io, kio vokas al ŝi.

Aĥ ! Prefere mi eĉ ne provu, ŝi pensis. Li taksus min strangulino, se li ne jam opinias tiel pri mi.

Roĉjo kuretis por reatingi ŝin. « Nu, kion vi pensas, ke diros Paĉjo, kiam li ekscios, ke vi jam havas koramikon ? »

« Paĉjo diros nenion, ĉar li ne scios pri tio ĉi ! Vi diros nenion al li. Ĉu vi komprenas ? Nenion. Nek al li, nek al Panjo. »

« Bone, mi ne parolos al li, se vi preferas, ke ne, Barbara. Ĉiuokaze Patro ĉiam ŝajnas iom grumblema lastatempe, ĉu ne ? Eble vi pravas. Eble pli bonus, se li ne scius pri Ĝarelo. »

« Kulpas lia laboro pri la malbona humoro. Estas la laboro, kiu ĉiam plej gravas al li. Nun li estas ĉi tie, meze de sia revo, kaj estas eĉ pli da laboro. Li ne havas tempon por ni. Li ne havas tempon por esti afabla. Tia estas Patro. »

Barbara pensis plu pri tio, dum ili promenis. « Ĉu vi scias, » ŝi diris finfine, « mi ekpensas, ke, fakte estas lia gravega, grandioza revo, kiu malfeliĉigas lin. »

Roĉjo diris nenion. Li pensadis pri la vortoj, kiujn lia fratino estis dirinta. Tiam li gardis ilin en anguleto de sia kapo kaj rapide rememoris ion alian, kion li volis demandi al ŝi. « Do, ĉu vi serioze volas, ke mi helpu vin lerni la taŭaklan lingvon ? »

« Jes, se vi bonvolas. Plaĉus al mi komenci ĉi-vespere. Kion vi pensas ? »

« Certe, kial ne ? » Roĉjo ridetis. Li apenaŭ povis kredi, ke lia fratino volas pasigi tempon kun li. La ideo feliĉigis lin.

Dum la cetero de la vojaĝo hejmen, Barbara diris malmulton. Ŝi donis nur etajn respondojn, kiam Roĉjo foje provis paroli kun ŝi. Ŝi estis perdiĝinta en siaj propraj pensoj pri Ĝarelo, pri tiu ĉi oazo, kiun ŝi ĵus trovis meze de la dezerto. Ŝi pensis pri lia unua kiso, kaj pri tio, kiel li petis, ke tiu estu de ŝi. « Estis mia dua kiso, » ŝi flustris silente al si, « sed mi sentas, kvazaŭ ĝi estus vere mia unua. »

En sia menso, ŝi rerigardis en liajn okulojn. Ŝi scivolis pri la flamo, kiun ŝi estas vidinta tie. Kiu estas tiu knabo ?



# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| **16-18-a de majo 2015 : 12-a MEKARO** | **Toronto, Ontario** |
| **17-25-a de julio 2015 : 48-a konferenco de ILEI** | **Oostende, Belgio** |
| **25-a de julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK** | **Lille, Francio** |
| **2-8-a de aŭgusto 2015 : 71-a IJK** | **Wiesbaden, Germanio** |
| **10-12-a de oktobro 2015 : ARE** | **Silver Bay, NY** |
| **21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO** | **Granby, Kebekio** |

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK) ĉe Resto Végo

| | |
|---|---|
| Vendredo, 9-an de januaro 2015 | Vendredo, 24-an de aprilo 2015 |
| Vendredo, 30-an de januaro 2015 | Vendredo, 29-an de majo 2015 |
| Vendredo, 13-an de februaro 2015 | Vendredo, 12-an de junio 2015 |
| Vendredo, 27-an de februaro 2015 | Vendredo, 11-an de septembro 2015 : jarkunveno |
| Vendredo, 13-an de marto 2015 | Vendredo, 25-an de septembro 2015 |
| Vendredo, 27-an de marto 2015 | Vendredo, 30-an de oktobro 2015 |
| Vendredo, 10-an de aprilo 2015 | Vendredo, 13-an de novembro 2015 |

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites

**Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien) :** 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d’espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d’espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est premise, avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d’espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction :** Sylvain Auclair et François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE :** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2015.02.20**

**3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d’espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d’espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

***Visitez notre site web !***

www.esperanto.qc.ca

## Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja-n Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

